


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 582 (5)

MAJO 1954



La nova universitato en Moskvo, konstruita 1949–1953
(vidu paĝon 141)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Enhavo

Specialaj Artikoloj :	paĝo
La Ĵurnalismo Esperantista : <i>Hans Jakob</i>	129
Pri la Pureco kaj Internacieco de Esperanto ! : <i>D-ro Ivo Lapenna</i>	135
Vizito en Sovetio : <i>Joel Vilkki</i>	141
La Plano de Kolombo : <i>Moŝto R. G. Casey</i>	151
Nobel-premio kaj U.E.A.	154
La Sesa Granda Koncilio Budhana en Birmo : <i>La Ven. C. Njanasatta Thera</i>	155
39a Universala Kongreso :	
Oratora Konkurso—Debato por gejunuloj	145
Oficiala Komunikado n-ro 7	146
40a Universala Kongreso :	
Loko de la Kongreso	146
Belartaj Konkursoj de UEA :	
1953 (Prozo) Portreto de Poeto : <i>Marjorie Boulton</i>	147
Poezio :	
Stranga kaptaĵo : <i>Eli Urbanová</i>	140
Konstantaj Rubrikoj :	
Enigma Konkurso	150
Nia Forumo	157
Niaj Mortintoj	160
Oficiala Informilo	159
Radio kaj Esperanto	134
Tra la Libraro	137
Tra la Mondo Esperantista	131

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 582

Majo 1954



La [^]Jurnalismo Esperantista

LA perioda presaĵaro esperantista, alivorte la gazetaro, ne ludas la saman rolon en la publika konsidero kiel la libroforma literaturo. Tamen la perioda literaturo, kiom ajn modesta ĝi aperas kontraŭ tiu de iu ajn nacia lingvo, meritas atenton. Kiom da valoraj skribaĵoj ja troviĝas en niaj periodaĵoj, nur la profesiulo konscias pri ĝi. Kaj pri tiu ĉi profesiulo temas nuna teksto.

Nia publiko konas pli malpli bone la verkistojn en Esperanto. Nomoj kiaj Baghy, Kalocsay, Privat, Bulthuis, Schwartz, Engholm, por citi nur kelkajn, revenas regule en beletristika konversacio inter-esperantista. Oni citas fiere la nomojn de niaj literaturistoj, ofte ne leginte iliajn verkojn.

Alie estas pri la ĵurnalisto esperantista. Amatora profesio ankoraŭ, sed plenumita kaj plenumata kun seriozeco kaj amo de respektinda nombro da samideanoj. En la bildo de nia movado, la redaktanto de periodaĵo ne estas mankebla kaj ne malutilas pasigi kelkajn minutojn por koni tiun-ĉi kreaĵon de nia movado, “la esperantistan ĵurnaliston”.

Nia unua periodaĵo titolita *La Esperantisto* aperinta de 1889 ĝis 1895

estis redaktita de tiu legenda persono Christian Schmidt en Nürnberg. Lin oni rajtas nomi la unuan ĵurnaliston-redaktoron en Esperanto. La dua periodaĵo esperantista el la heroeca epoko estis *Lingvo Internacia*, eldonita de la Klubo en Upsala, redaktita de Valdimir Gernet, en Odessa, helpata de Vlademar Langlet en Upsala. En 1899 redaktis tiun-ĉi periodaĵon Paul Nylén, profesia ĵurnalisto. Depost 1900 ekaperas sinsekve novaj periodaĵoj, ĉiuj kun pli aŭ malpli longa vivo. La unua profesia ĵurnalisto esperantista estis H. Hodler, kiu entute sin dediĉis al la redaktado de *Esperanto*, la organo de UEA, aperinta (sub diversaj formatoj) ĝis 1914 dufoje en la monato, kun 16 ĝis 20 paĝoj.

La esperantista ĵurnalisto-redaktoro prezentiĝas tiel: (1) Amatora; (2) Profesia en nacia lingvo, redaktante honorofice esperantan periodaĵon; (3) La nur-esperantista aŭ ĉefe esperantista redaktoro-ĵurnalisto.

Se la esperantista ĵurnalisto mal-similas laŭ la karakterizo—amatora-profesia—ĉiuj similas en unu punkto! Laboris kaj ankoraŭ nun laboras ĉiuj esperantistaj ĵurnalistoj libervole aŭ,

por esti preciza, sensalajre. La sola profesia redaktoro-ĵurnalisto nuntempa, kiu dediĉas sian tutan tempon je tiu ĉi profesio, estas Teo Jung, la redaktoro-eldonanto de *Heroldo de Esperanto*. Ĉiuj ceteraj ĵurnalistoj esperantistaj nuntempaj laboras sensalajre, iuj kun tre modesta kompenso ne kvalifikebla kiel salajro.

La laboro de redaktoro esperantista ne estas komparebla je tiu de redaktoro de organo de alia batalanta movado. La kelkaj internaciaj periodaĵoj esperantistaj praktikas devigan neŭtralecon koncerne politikon, religion kaj pri sociaj problemoj tagaj. Ili do estas ĉefe informaj, kun neta tendenco idealisma, defendantaj tuthomarajn interesojn tiel, kiel formulas ilin la "Deklaro de la hom-raĵoj". Tia etendiĝo devigas, ke redaktoro posedu vastan konon pri tutmondaj aferoj, ke li estu larĝanima kaj ke li estu kritikema pri si mem. Li estas devigata prijuĝi tekstojn senditajn al li, manuskriptojn de ofte duba valoro laŭ formo kaj enhavo. Li konu la movadon kaj la agantajn fortojn, kaj apliku tiun-ĉi sperton en la prijuĝo de la materialo ricevata. Alivorte li estu indulga, ne traktu fervorulon kiu jam sin vidas verkisto laŭ momenta inklino, sed serĉu lin formi. Tio nature postulas multe da korespondado kaj ĉiu nuntempa esperantista redaktoro konfirmas tion. Resume, la esperantista redaktoro devas esti sperta en la redaktado, vasthorizonta en prijuĝo de laboraĵoj, kaj pacienca en la rilato kun la bonvolaj kunlaborantoj, ankoraŭ ne spertaj.

La idealo ja estas, ke iam ekzistos periodaĵoj esperantistoj kiuj povus vivi kiel naciaj periodaĵoj el abonoj kaj anoncoj, kaj sekve okupigi salajr-

itan redakcian stabon. Povas esti, ke la du militoj tiom profunde ŝanĝintaj ĉion, ankaŭ kulpas ke tio ne jam estas. Tiu-ĉi konstato tiom negativa, estas sama ĉe multaj periodaĵoj nacilingvaj, revuoj specialaj, organoj de societoj kaj aliaj. Eĉ la dekmilope presataj revuoj kun stabo de redaktoroj kaj kunlaborantoj salajrataj luktas por la ekzisto, precipe se ili estas principemaj pri ricevo de "subteno" (kion iuj nomas malice "subaĉeto").

Konklude: En la socia mozaiko de la Esperanto-Movado, la esperantista redaktoro estas apenaŭ videbla, kvankam lia agado iamaniere donas direkton al ĝi. Iom post iom kreiĝas la gildo de esperantistaj ĵurnalistoj el kio iam estiĝos profesiuloj same konsiderataj kiel tiuj de nacilingvaj periodaĵoj.

Hans Jakob.

Honoron al tiu, kiu honoron meritas

En mia artikolo *La internacia help-lingvo antaŭ tutmonda areopago* (vidu paĝon 67/9, marto 1954) englitis eraro pri fakto. Mi diris, ke la tutan laboron plenumis Prof. Lapenna, helpata de Edmond Privat kaj E. D. Durrant.

Vero estas, ke entreprenis la klopodadon ĉe UNESKO kiel komisiito de la Estraro de UEA, Sinjoro E. D. Durrant. Li preparis por tiel diri la grundon sur kio ĉio cetera estas logika sekvo. En la UNESKO-konferenco laboris kune samideanoj Durrant kaj Lapenna, helpataj per konsiloj de Edmond Privat.

La redaktoro senkulpiĝas pri tiu ĉi ne-intencita modifo de historia fakto.

La Redaktoro.



Tra la Mondo Esperantista



Belgujo

Flandra Ligo Esperantista, la Nederlanda Federacio "La Estonto Estas Nia" kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista okazigos komune Beneluksan Kongreson dum la venontaj Pentekostaj festotagoj (la 5an, 6an kaj 7an de junio), en Liège, Belgujo.

La organiza komitato, en kiu sidas reprezentantoj de la tri ligoj, starigis allogan programon, kiu lasos al la partoprenontoj plej bonan memoron de ili restado en la valona ĉefurbo.

La kongreson patronas altaj instancoj de la Lieĝa provinco, i.a. S-ro P. Harmel, Ministro por Publika Instruado, S-ro P. Clerdent, provincestro, S-ro P. Gruselin, Urbestro, kaj la tuta skabenaro de la urbo Lieĝo, S-ro A. Buisseret, senatano, S-ro J. J. Merlot, urbestro de Seraing, S-roj Petry kaj Renard, provincaj estraranoj, S-ro Pirmez, provinca prezidanto de Ruĝa Kruco de Belgujo, k.t.p.

Pli ol 100 partoprenontoj jam sin anoncis je la fino de februaro. Ni ŝatus ankaŭ partoprenon de eksterlandanoj. Petu informojn ĉe la sekretario: S-ro J. Soyeur, Rue du Chêne 91, Seraing (Liège), Belgujo.

Francujo

S-ro Charles Chareille, prezidanto de la Metia Ĉambro de departamento Creuse en Francujo, gvidanto-fondinto de ferio-centro por metiolernantoj (instalita en malnova rekonstruita

muelejo en Bonnat, Creuse) deziras akcepti diverslandajn esperantistojn dum la venonta somero, por ke en tiu centro regu internacia atmosfero de interfratiĝo. La restadokondiĉoj estas tre malmultekostaj.

Plie, oni oferas senpagan gastigadon dum unu aŭ du semajnoj en la somero al unu reprezentanto por ĉiu lando de Eŭropo (escepte al belgoj, nederlandanoj, germanoj, italoj kaj angloj, jam anoncintaj sin kiel vizitontaj la muelejon).

Oni skribu al: S-ro Pierre Delaire, Direktoro de C.N.E.O., 9 bis, rue du Ct-de-Poli, Orléans (Loiret), Francujo, kiu transdonos la petojn al la ferio-centro.

La gastoj kompreneble estu prefere metiolernantoj.

Niajn gratulojn kaj dankojn al S-ro Chareille, grava persono en la metiofaka movado, kiu eklernas Esperanton por akcepti eksterlandajn gastojn venontsomere.

Jugoslavujo

El Beograd ni ricevis kuraĝigan novaĵon pri progreso kaj aktiveco, kiun ni certe volas sciigi al la legantoj. Ŝajne antaŭ la 38a kongreso laboris en tiu urbo nur malmultaj samideanoj. Sed la bruo pri la kongreso reaktivigis malnovajn esperantistojn kaj pliaktivigis novulojn. Ĉirkaŭ kvindek Beogradanoj partoprenis la kongreson, kaj post la kongreso oni tre bone utiligis la bruon koncerne la kongreson, tiel ke en oktobro pasintjara en la

klubejo oni komencis instrui Esperanton al 250 personoj. Por progresintoj estas nun daŭriga kurso, kaj ankaŭ supera kurso. En marto ĉijara komenciĝis ses porkomencantaj kursoj, inter kiuj unu porinfana kurso.

Lastatempe fondiĝis Studenta Esperanto-societo ĉe la universitato de Beograd. Ankaŭ oni organizis la subskribon, flanke de multaj homoj, de deklaracio poresperanta, prezentota al la Ministerio por Kulturo kaj Klerigo, kun peto por enkonduko de Esperanto-katedro ĉe la Beograda Universitato.

Radio-Beograd, kiu jam elsendas E-kurson, pretas enkonduki ankaŭ prelegojn en Esperanto, se ĝi ricevos sufiĉajn petojn. Do nepre skribu al: Radio-Beograd, Helendarska 2, Beograd.

Por ke la societo pli detale informu la anaron, kaj ankaŭ amikojn eksterlandajn, oni komencis eldonadi monatan gazeton *La Progreso*, kiun povas ricevi ĉiu societo skribante al: Esperanto-Societo, Jerazije 42, Beograd, Jugoslavujo.

Kimrujo

La 18an de Majo multaj landoj aŭdos la Internacian Lingvon sekve de radiodissendo de Cardiff je la 17a horo, kiam okazos denove la tradicia festo de la Tago de Bonvolo. Infanoj el multaj landoj tiam brodkastas mesaĝojn en multaj lingvoj. Atentu, ke la dissendo okazas je malsamaj horoj en la diversaj landoj.

Svedujo

Sveda Esperanto-Instituto invitas al nova prelegsemajno en 1954. Ĝi okazos 8–15 aŭgusto en Frostavallen, Höör, Svedujo, tuj post la grandaj kongresoj. La nombro de la partoprenantoj estas limigita, do tuj petu informon de S-ro Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

Tre allogan programon oni aranĝas, kun serio de prelegoj de la jena impona kvaropo da prelegantoj: D-ro Ivo Lapenna faros prelegserion pri "La Eŭropa Konsilantaro kaj la ideo de Eŭropa Federacio"; Docento S. Pragano pri "Kulturaj perloj en



S-ro Budimir kun siaj kursanoj en Beograd

la originala Esperanto-literaturo"; D-ro F. Szilágyi pri "Spertoj, komparoj kaj instruoj" kaj Licenciato Tibor Sekelj pri "Mezamerika Kulturo". Krome okazos ekskursoj, kabareto, balo, kaj diversaj distraĵoj.

KELI Konferenco en 1954

Tuj antaŭ la nunjara UEA kongreso en Haarlem, Kristana Esperantista Ligo Internacia konferencos ankaŭ en Nederlando. De la 24a ĝis 31a de julio la anoj, simpatiantoj, interesigantoj estos kune en la bela konferencejo "Pietersbert", Oosterbeek apud Arnhem. Diskutoj, ekskursoj, distraĵoj, promenadoj k.t.p. apartenas al la varia programo de la renkontiĝo. Informon petu de S-ro A. Storm, Goudsbloemstraat 13-c, Vlaardingen, Nederlando.

Kongresa Diservo en Haarlem

Unika okazontaĵo estas, ke la Diservo en la kadro de la UEA kongreso estos elsendata de la radio. Notu jam, ke la 1an de aŭgusto, de la 11.00 ĝis 12.00, vi povos ricevi kontakton kun la Esperanto-kongresa Diservo pere de la Nederlanda Radio-asocio "IKOR". Pliposte ni anoncos la ondlongon de la elsendo.

Kolektado de Esperantaĵoj

Ni ricevis informon pri la fondo de nova internacia klubo, Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo. Interesatoj skribu al: S-ro Louis Obreczian, 213½ Sixth Street, Windber, Pa., Usono.

Organizaĵo Monda de Sano

El la oficejo de la supra organizaĵo ni ricevis ekzempleron de artikolo verkita de ĝia Ĝeneralsekretario. La artikolo titoliĝas "La Flegistino, Pionirino de la Sano", kaj celas instigi al junulinoj entrepreni la

flegadon kiel karieron. Ke tia mondvasta organizaĵo, filio de la Unuiĝintaj Nacioj, utiligas kiel komunikilon nian lingvon, konfirmas nian kredon, ke ĝi estas nepre necesiĝo por bonfaraj internaciaj organizaĵoj.

Internacia Konkursio 1954


Stato je la 31a de marto

	Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando ..	2000	2555	127.7
2. Kanado ..	250	280	112.0
3. Urugvajo ..	250	270	108.0
4. Svislando ..	1500	1510	100.7
5. Germanujo ..	3600	3560	98.9
6. Portugalujo ..	500	455	91.0
7. Maroko ..	700	625	89.3
8. Nederlando ..	4600	4065	88.4
9. Hispanujo ..	1600	1390	87.0
10. Japanujo ..	900	780	86.6
11. Sudafriko ..	300	260	86.6
12. Francujo ..	5600	4601	82.2
13. Italujo ..	2900	2380	82.1
14. Britujo ..	9500	7498	78.9
15. Aŭstrujo ..	850	670	78.8
16. Svedujo ..	5900	4620	78.3
17. Islando ..	350	265	75.7
18. Usono ..	2300	1739	75.6
19. Kubo ..	250	170	68.0
20. Jugoslavujo ..	1600	1075	67.2
21. Aŭstralio ..	1000	665	66.5
22. Belgujo ..	2300	1494	65.0
23. Danlando ..	2500	1575	63.0
24. Norvegujo ..	2300	1370	59.5
25. Venezuelo ..	250	140	56.0
26. Izraelo ..	250	140	56.0
27. Novzelando ..	850	450	52.9
28. Irlando ..	250	105	42.0
29. Argentino ..	950	345	36.3
30. Brazilo ..	6400	2150	33.6

En novembro 1954 estos libera la ofico de Administranto ĉe U.E.A. Antaŭvidita monata salajro £40.

Personoj kiuj deziras kandidatiĝi sendu siajn proponojn, kun priskribo de sia aĝo, ŝtataneco kaj kvalifikoj (aparte en la Esperanto-movado) al la Prezidanto de U.E.A., S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

La proponoj devas atingi lin antaŭ la fino de junio 1954.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	18.30–19.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 12-V). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.50–23.10	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radió Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Aŭstra Radio. Malfacile estas raportoj pri la aŭstraj programoj, ĉar laŭ ricevataj informoj, ili ne havas longdistancon trafopon. La posttagmezaj elsendoj de Wien II kaj Graz okazas je horoj nefavoraj al facila aŭskultado pro malbona propagado de ondoj. La ĉiulunda elsendo de Wien I atingas Francujon kaj Britujon vintre laŭ variebla forteco nur per ondoj 513m.; pli fortaj najbaraj stacioj malebligas klaran aŭskultadon.

Radio Roma. 5-V, Novaĵoj el Italujo; 7-V, Florenca Muzika Majo; 12-V, la Itala Romanco kaj F. P. Tosti; 14-V, Leterkesto kaj bibliografio; 19-V, Karl Vanselow, la verdstela trobadoro; 21-V, la tago de la bona volo; 26-V, la "Festo de la Grilo" kaj la "Ludo de la Ponto" en Toskanio; 28-V, Pri la 6a Int. Kongreso de Esperantaj Fervojistoj (Verona, 3-8 Majo 1954).

D-ro I. Lapenna :

Por la Pureco kaj Internacieco de Esperanto !

UNU el la fundamentaj kvalitoj de Esperanto estas ĝia internacieco : internacieco ne nur laŭ la internaj konsistaj elementoj, laŭ la celo kaj apliko, sed ankaŭ pro la internacia karaktero de la kolektivo, kiu estas la socia portanto, la spirita posedanto kaj evoluiganto de la lingvo. Tiu esenca eco de la Internacia Lingvo estas la ĉefa kaŭzo de ĝiaj ĝisnunaj sukcesoj kaj absoluta garantio por la estonteco. Konservu, ame gardi kaj flege evoluigi per ĉiuj rimedoj la internaciecon de la lingvo estas, tial, elementa devo de ĉiu esperantisto.

Tute specialan respondecon sur tiu ĉi kampo havas niaj verkistoj, tradukantoj, poetoj, redaktoroj kaj kunlaborantoj de gazetoj, instruistoj, prelegantoj kaj aliaj personoj, kiuj pro sia elstara pozicio estas imite sekvataj de la aliaj. Klara, vere internacia, do ĝis la plej alta grado perfekta Esperanto, eliranta iliajn buŝojn aŭ el sub iliaj plumoj, signifas sendube personan avantaĝon por la aŭtoroj kaj ĝuon por la aŭskultantoj aŭ legantoj. Samtempe—kaj tio vere havas unuarangan gravecon—tia senripoĉa stilo fortikigas la unuecon de la lingvo kaj kontribuas al ĝia normala evoluo sur la striktaj reloj de tiu unueco.

Kompreneble, ĉiu, eĉ la plej bona uzanto de kiu ajn lingvo, povas erari. Tio ne estas evitebla en la naciaj lingvoj. Tio povas okazi ankaŭ en Esperanto. Se temas pri eraroj pli malpli hazardaj, sporadaj, iusence personaj, la afero certe estas iom ĝena kaj malagrabla, sed neniel tragika :

tiaspeca individua erareto ne endanĝerigas la internacian unuecon de la lingvo. Krome, ĝi estas facile korektebla.

Male, se temas pri vortoj aŭ formoj, kiuj estas konstante erare aplikataj de iu tutagrupoda personoj—plej ofte nacia grupo—tiam la danĝero estas tre serioza. Tiaj kolektivaj eraroj mordas la fundamentojn de Esperanto kaj povas eĉ detrui la bazon mem, sur kiu elkreskis kaj ĉiam pli kreskas la grandioza konstruaĵo de komuna, tuthoma lingvo. Tial, ili estas detruendaj en siaj radikoj mem.

La aluditaj kolektivaj eraroj havas ĉiam sian fonton en la naciaj lingvoj. Sub la influo de sia propra nacia lingvo la esperantistoj de la koncerna lando ekuzas vortojn aŭ formojn, kiuj ne estas Esperantaj. Pro la konstanta ripetado de tiuj eraroj ili ne plu sentiĝas kiel eraroj en la kadro de tiu grupo, sed ili estas uzataj kiel tute normalaj, ĝustaj formoj. Tamen, ili estas aŭ nekomprenataj aŭ miskonprenataj en aliaj medioj.

La kroataj, serbaj, slovenaj kaj aliaj jugoslaviaj esperantistoj havas, ekzemple, la tendencon esperantigi la naciigitajn internaciajn vortojn. Anstataŭ uzi la ĝustan Esperantan esprimon, ili kelkfoje prenas naciigitan formon de internacia radiko kaj tute simple aldonas al ĝi la Esperantan finaĵon ! Tiele oni ĝenerale en tiu lando uzas la vortojn *konstruktiva*, *materiale*, *permanenta* k.t.p. anstataŭ *konstrua*, *materie*, *konstanta* k.t.p. Oni, plue, parolas pri partizanaĵoj *akcioj*, kvankam laŭ mia scio la partizanoj ne posedis akciojn nek

estis akciuloj ! Fakte, oni tute ne volis paroli pri *akcioj*, sed pri *agoj* aŭ *aktivecoj*, depende de la senco.

La italaj esperantistoj regule ion legas *sur* la ĵurnalo. Kompreneble, oni povas legi ankaŭ starante sur iu ĵurnalo ! Tamen, tio verŝajne ne okazas tre ofte. Kutime oni sidas sur seĝo kaj legas ion *en* ĵurnalo. La saman eraron faras sufiĉe ofte ankaŭ la francaj kaj hispanaj esperantistoj. La Francoj, krome, havas *edit*-artikolon en sia oficiala organo : temas, fakte, pri ĉefartikolo, aŭ fruntartikolo. La Francoj invitas vin al la tagmanĝo dirante : “Mi *oferos* al vi tagmanĝon”. Sendube, kelkfoje tia invito estas tre ĝena, eĉ ofera, precipe se temas pri ne tre interesa persono. Tamen, eĉ en tiaj okazoj, oni ne kutimas tion diri al la invitito, al kiu oni *prezentas* tagmanĝon, aŭ, se oni preferas, kiun oni *regalas* per tagmanĝo. *Oferi* tagmanĝon signifas ofendi la invititon. La saman eraron faras multaj italaj kaj, ne malofte, britaj esperantistoj.

En kelkaj kazoj la britaj esperantistoj uzas forme ĝustan Esperantan vorton, sed kun la senco, kiun ĝi havas en la angla lingvo. Jen nur kelkaj ekzemploj :

Lingvisto ne estas persono, kiu scias plurajn lingvojn, sed sciencisto, kiu studas la strukturon de la lingvo, la leĝojn de ĝia evoluo, kvankam li, eble, parolas nur unu lingvon. Tiu, kiu scias plurajn lingvojn, estas *poligloto*.

Socia vespero estas en Esperanto vespero koncernanta la homan socion ! Tute alia afero estas *societa* aranĝo, aŭ amuzo, aŭ eĉ societa vespero.

Varma aŭ *malvarma* povas esti forno, supo, ĉambro. Ankaŭ la homo estas varma, se li havas febron, aŭ

malvarma post kiam li mortis ! Se—havante normalan temperaturon—oni sentas varmon aŭ malvarmon, oni devas ne diri “mi estas varma aŭ malvarma”, sed “al mi estas varme aŭ malvarme”. Dirante “mi estas varma”—kio, cetere, povas esti tre bela kvalito de la temperamento—oni riskas miskomprenon, precipe en konversacio kun sudlandanoj.

Oficisto estas persono, kiu *profesie* plenumas iun oficon. Tial li ricevas salajron. Kiam mi la unuan fojon aŭdis, ke la Londona Esperanto-Klubo elektos siajn *oficistojn*, mi sentis grandan kontenton. Jen—mi pensis kun fiero—kiel forta ĝi estas : eĉ plurajn oficistojn ĝi havas. Poste mi konstatis, ke temas pri prezidanto, vicprezidantoj, sekretarioj kaj aliaj estraranoj, komitatanoj, konsilanoj, funkciuloj . . . sed ne pri oficistoj !

Fine, “mi estu permesata” fari ankoraŭ unu rimarketon. *Permesi* signifas konsenti ke iu *faru* ion. Sekve, oni povas permesi fumadon, kantadon, dancadon, sed oni ne povas permesi personon. Tial, en la pasiva formo, oni povas diri, ke la fumado estas permesita, sed oni ne povas diri : Mi, aŭ vi, aŭ persono estas permesita.

Mi donis nur kelkajn ekzemplojn de kolektivaj gravaj eraroj. Feliĉe ili ne abundas, sed la ekzisto, la konstanta praktikado eĉ de nur kelkaj prezentas tiel seriozan danĝeron, ke estis necese atentigi pri ĝi, por ke tiu tendenco estu ĝustatempe ne nur haltigita, sed ankaŭ senprokraste forigita.

Por konservi la plenan internaciecon de la lingvo estas konsilinde entrepreni jenajn paŝojn :

La plej kompetentaj esperantistoj atentigu pri la ĉefaj eraroj, kiujn faras iliaj samnacionoj, en la landaj



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj**, kaj kiel prilukti ilin, de Paul Neergaard, el Kopenhago. 234 p., 23 × 15.5 cm., kun 74 fotobildoj, 1 desegnaĵo, kaj 9 koloritaj tabuloj. Prezo 20 ŝil., afranko 1 ŝil. Eldonis The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo, 1954.

Nekontestebla la pozicio de D-ro Neergaard laŭ la plantpatologoj: liaj antaŭaj verkoj estas mondfamaj. Por la Esperantistoj estas bonaĵo, ke finfine ili povas akiri ĉiajn specojn de scio pri la fungoj, bestetoj, kaj aliaj kaŭzoj de atakoj kontraŭ ĝardenplantoj. Tio volas diri, ke sub mano nun estas havebla, ne nur scio pri la kaŭzoj mem (kvankam multo pri ili estas sciinda) sed ĝusta, akurata, kaj profitebla scio pri ĉiaj atakrimedoj kontraŭ la atakantoj—ne forgesante la rimedojn prudentajn rilate al atakontoj! Kiu posedas tiun-ĉi libron, ne allasu sin pri nuraj singratuloj, nek pri la cirkonstanco, ke li havas sur breto bonegan ekzemplon de la uzo de la lingvo Esperanto; li devas antaŭ ĉio eluzi ĝin ĉiel inter siaj neesperantistaj ĝardenamantoj, por ke ili ĵaluziĝu, ke en iliaj lingvoj ne ekzistas tia libro. Mi ne konas libron verkitan angla-lingve kiu valoras siaspece la duonon de *Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj*.

La libro estas grandparte reverko de danlingva tria eldono de la aŭtoro; tiu-ĉi havis kompreneble specialan



D-ro Paul Neergaard

intereson laŭ danaj cirkonstancoj. La nuna verko ampleksas la mezvarmajn terzonojn; tial, ne nur la lingvo, sed la tuta libro, estas internacia. La antaŭparolo diras: "Tiu ĉi libro estas la unua en Esperanto, kiu pritraktas temojn de hortikulturo, plantpatologio kaj plantdamaĝaj insektoj". Oni aldonu nur, ke la verko apogas sin sur la *principoj* de priluktado; sed la legantoj valorigados ĝin plenparte pro la praktikaj scioj "tra la jaro" pri ŝprucigado, pulvorado, elmeto de venenbrano, k.t.p.; ili estas ĝisdataj.

Oni fidu sin plejvolonte al la libro, ĉar okazas en ĝi rubrikoj similaj al: *Ĉu la venenoj prezentas danĝeron?* kaj *Ne sufiĉas nur ŝprucigi.* La

bibliografio (inkl. verkoj en Esperanto) kaj terminaro estas bonaj. Strange estas, ke kvankam Danujo kaj Britujo estas najbaroj, sub “Konsult-eblaj institucioj” en britaj insuloj aperas nur Anglujo; alie, la verko estas vere internacia. La libro enhavas naŭ klarajn kaj belajn kolortabulojn de insektoj, fungoj, atakitaj folioj, k.t.p. Tiuj pentraĵoj, kune kun la riĉeco de aliaj bildoj, aspektigas la libron kiel bela bild-libro. La libro estas perfekta kiel presaĵo, ĝia lingvo estas senerara. Ĝuebla de ĉiu—fakisto aŭ ne.

*Hugh Nicol, Ph.D., F.R.I.C.,
F.R.S.E., Profesoro pri
agrikultura ĥemio ĉe la
Agrikultura Kolegio de
Okcident-Skotlando.*

***Ivan VI**, kvinakta teatraĵo de Geraldo Mattos. Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro. 144 p., 12.5 × 18 cm. Prezo: broŝ. 10 ŝil., bind. 14 ŝil., afranko 6p.

En 1740 naskiĝis Ivan VI-a kaj ankoraŭ ne unujara ricevis la sanktan oleon de caro de Rusujo. Regentis unue la Duko de Corland kaj poste la patrino de Ivan. En la fino de 1741 Elizabeto Petrovna, praonklino de Ivan, perforte akiris la tronon kaj sendis lin en karceron, kie li restis 12 jarojn. En 1756 timante ribelon ŝi transportigis Ivan en fortikaĵon, kie eĉ la komandanto ne sciis lian iden'econ. Post la morto de Elizabeto en 1761 Katarina la Granda akiris la potencon kaj post vizito al Ivan ordonis, ke en okazo de provo liberigi lin la gardisto tuj lin mortigu. La amikoj de Ivan nesciaj pri tiu dekreto provis lin savi. La gardisto plenumis la ordonon de Katarina. Jen resume la historio prezentita en ĉi tiu teatraĵo. Prave diris Voltaire:

“Al mi ŝajnas, ke Katarina liveris al la dramaturgiistoj temon por grandioza tragedio.”

Geraldo Mattos, kies burĝonanta talento sin montris en *La Tento de Junulo*—drameto pri Zamenhof—iom aŭdacis provante prezenti tiun historion per originala teatraĵo en poezia formo. Ĝis nun tiu artformo ne estis tre sukcesa inter la Esperantaj poetoj. La leganto tamen baldaŭ konstatas ke ĉi tiu juna artisto posedas talentojn neordinarajn, ke li estas bone ekipita por tiel ambicia rolo, kiel dramisto Esperanta. Mattos estas serioza, iom asketa poeto kun frue maturiĝinta sed profunda filozofio. Liaj stilo kaj prezento estas klasikaj kaj oni povus eĉ supozi, ke oni legas verkon el antaŭa epoko. Eĉ rilate la idiomon de la teatraĵo, tio estas kvazaŭ eĥo el alia mondo. Pri la Esperanto uzata evidentas la influo de la fruaj uzantoj de la lingvo. La poezio estas facile legebla kaj la lingvo “popola”. Eksperimentojn kaj neologismojn la aŭtoro ĝenerale rezignas kaj elizio maloftas. La versoj estas en formo de jamboj kun ekstra silabo. La rimantaj versduoj per sia ŝajna simpleco kaŝas eksterordinaran talenton je vortelektio.

La leganto kiu donas atenton al la enhavo de poezio (kontraste kun formo) trovos ĉi tie abundan materialon por pristudo kaj medito en la lerte enplektitaj aksiomoj plenaj de saĝeco. Jen kelkaj reprezentaj ĉerpaĵoj: . . . *eĉ fidelan koron mono knedas; Timo estas dua ombro, Eterne nin sekvanta ĝis la tombo; La vipo kaj la tim' en samaj manoj Troviĝas, kiel ecoj de tiranoj; Se potenculo iom malavaras Senpage eĉ la hundoj jam ne flaras; Antaŭan krimon plia krim' ne viŝas.*

Se ekzistas manko ĉe Mattos tio

estas en lia ankoraŭa nepercepto de "koloro" kaj la senfina riĉo de tonvaloroj, en lia neglekto de atmosfero. Li plie estas—almenaŭ ĝis nun—"predikanto" donanta sian interpreton de homaj agoj kaj voĉanta por siaj roluloj. Tio neeviteble donas ian sekecon al lia poezio (videblan ankaŭ en aliaj poeziaĵoj ankoraŭ ne eldonitaj, kiujn mi havis la privilegion legi). Tio tamen estas manko nur de nesperto. Kiam Mattos turnos sian atenton al la naturo kaj la mondo ĉirkaŭ li, kiam li sentos la sensan ĝuon de vortoj kaj muzikon de ravaj tonoj tiam la esperantistoj posedos poeton de vere granda staturo.

La preso kaj papero de ĉi tiu volumo estas bonaj. Pri originala poeto la esperantista publiko nepre volas fanfaroni sed tia nefinpreta volumo (eĉ kun paĝoj netranĉitaj!) apenaŭ elokventas por okulo fremda. Sur librobreto ĝi tute ne pompas. Kiam, ho kiam niaj eldonistoj komprenos, ke domaĝante kelkajn groŝojn je teknika prezento, ili faras neripareblan difekton al la tuto?

Mason Stuttard.

Elektitaj Poemoj de Boro Pavlović. Trad. M. Demetrović, M. Mamuzić kaj Z. Takač. Eld. Kroatia Esperanto-Ligo, Zagreb. 16 p., broŝ. Prezo 2 rpk.

Libreto de 15 poemoj de kroata poeto kun antaŭparolo de M. Gjivoje. Evidentas en la preparado multe da malzorgemo kaj por tiel malgranda eldonaĵoj troviĝas tro da eraroj presaj kaj stilaj. Tro da ŝtopado de ritmaj truoj per *ja* kaj kelkaj strangaj formoj (*Esperanton* 1938-an p. 3; *lavujo* p. 7; *akvumas vent'* p. 11; *Aŭtoportreto* (portreto de aŭto! Vidu P.V.) p. 13; Al Morta Poeto (Mortinta) p. 15; *Malvarmumita*

(*Malvarmuminta*) p. 8, kaj *sordine* mi ne komprenas.)

Mi ne povas diri, ke ĉi tiu estas bona komenco por la Eldonejo K.E.L. La jugoslavianoj povas pli bone fari ol tio.

Mason Stuttard.

Personaj Pronomoj. Kenĵi Ossaka. Eldonis la Katolika Asocio de Japanaj Esperantistoj. 105 paĝoj, 24.5 × 17.5 cm. Broŝ. Ŝablone multobligita. Havebla ĉe KAJE ĉe A. MATUBARA-Hatirô Nanmatutyo 24, KISIWADA, Japanujo, kaj IKUE. Prezo 6ŝ. aŭ egalvaloro.

Ne havu iluzion, ke ĉi tiu verko tenas intereson nur por japanoj. Eĉ se ĝi estis unualoke verkita por japanoj, aludoj al la japana lingvo estas tre maloftaj kaj neniel bremsas la grandan valoron de la enhavo por ĉiu iom progresinta Esperantoparolanto. Temas pri vere detala, fidinda studo de la personaj pronomoj el ĉiu vidpunkto. Mi ĝis eklego ne konstatis kiel interesa povas esti tia penetro en la motorsalonon de nia ŝipo. Malprofiti oni ne povas aĉetante ekzempleron kun la celo—gustumi mem.

L. Galindo.

Resumo de Provkatalogo pri esperantaj poŝtstampoj. Eld. IEMW. 21 × 15 cm. 12 paĝoj. 2rpk.

Esperantista Ferio en Norvegujo. Unu el la plej allogaj eblecoj por ferio post la Universala Kongreso estas montrita per ĉi tiu prospekto 6-paĝa, bele presita. Inkluziva kosto de la restado k.t.p. estas nur 150 n.kr. (aŭ anglaj ŝilingoj). Se ferio en la plej bela regiono de okcidenta Norvegujo povas tenti vin, petu prospekton ĉe Kristian Sivertsen, Blekenberg 52, BERGEN, Norvegujo.

Kio estas la Mondcivitana Respubliko? Klariga broŝuro pri ĉi tiu tute nova socia kaj politika kreaĵo, kiu, mallonge, celas esti la embrio de aŭtonomia, unuiginta homaro. Ĝi ricevis donace terpecon en Grekujo, havas propran standardon kaj, pli grave, alprenis Esperanton kiel sian ĉeflingvon. Ke la organizaĵo ne estas malforta bebo pruvas la fakto, ke ĝi kolektis preskaŭ £200 por la Grekujaj tertrema katastrofo. Interesatoj turnu sin al la Civitaneca Fakto, La Mondcivitana Respubliko, 27 Red Lion Street, London, W.C.1, aldonante respondkuponon.

Internacia Ferio-Semajno en Konstanz. Bela fototipia prospekto kun ĉiuj detaloj pri ĉi tiu tre rekomendinda ferio estas havebla ĉe IFS Esperanto, Grüngang 8, KONSTANZ, Germanujo.

Antverpeno. 6-fota, 6-paĝa tut-esperanta prospekto pri ĉi tiu centro de arto kaj muzeoj havebla ĉe "Propagando kaj Turismo" Antwerpen.

Vichy. La *Syndicat d'Initiative* en sia nova 32-paĝa broŝuro (informo-plena!) inkludis duonan paĝon de Esperanta teksto. Interesatoj petu ekzempleron ĉe "Syndicat d'Initiative", 11 rue du Gare, Vichy.

Eli Urbanová :

Stranga kaptaĵo

*Ĉe roka bordo bobelas
kapricaj ondoj en la sun',
ruliĝas tie kaj ŝvelas
kaj ŝaŭme cedas nun.*

*Por petoladi multmove
revenas ili de la fund',
perliĝas, poste denove
murmuras en profund'.*

*La maro muĝas agorde ;
sonĝante pri la orĝet'
fiŝisto juna surborda
dormetas en kviet'.*

*Li longe kuŝas lulite,
rideton mildan sur la buŝ',
jen—vangan lian subite
aspergas densa duŝ'.*

*Leviĝas alte la maro,
baraktas io en la ret'—
kaptiĝis ora hararo
de mara virinet' !*

Por la pureco de Esperanto : *fino*

Esperanto-organoj kaj konsilu la uzon de korektaj formoj. (Parenteze estu dirite, ke estas nekorekte korekti la vorton korekta en tiu ĉi senco.)

En la kluboj kaj societoj oni reenkonduku la bonan malnovan, nun iom forgesitan, kutimon amike korekti la preleginton ankaŭ el lingva vidpunkto.

De tempo al tempo oni aranĝu en la grupoj diskutvesperojn pri lingvaj problemoj. Oni invitu la plej kompetentajn lokajn esperantistojn, por ke ili respondu al la starigitaj demandoj.

Espereble la supraj rimarkoj kaj konsiloj ne restos seneĥaj. Ili estu akceptitaj tiel bonintence, kiel ili estas eldiritaj.

Sportamantoj, kiuj pretas kunlabori je kompilado de Sporta Terminaro eldonota de UEA, bonvolu turni sin kun eventualaj ideoj kaj proponoj al la kompilanto: S-ro John Rapley, Esperanto-Domo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Joel Vilkki :

Vizito en Sovetio

KUN grandaj atendo kaj intereso mi meze de februaro akceptis informon pri mia elekto en suomian instruistan delegacion, kiun sovetia kleriga ministrejo invitis por konatiĝi al tieaj eduko kaj instruo. Semajnon poste komenciĝis la du-semajna multenhava esplorvojaĝo trans la “fera kurteno”, kiun trapasante ni apenaŭ rimarkis eĉ ordinarajn doganajn formalizaĵojn.

Nia vizito daŭris du semajnojn, el kiu tempo du tagojn en Leningrad kaj la reston en Moskvo, de kie oni nin ankaŭ flugigis al Kaŭkazio por ripozi tri tagojn en tute nova sanatoria urbo Soĉi apud Nigra Maro.



El kolĥozo en Soĉi


La ripozo estis vere necesa, ĉar la estado en la grandurboj estis plensargita de ĉiuspeca programo de mateno ĝis malfrua vespero. Kiel princojn oni nin loĝigis en luksaj hoteloj, manĝigis kaj trinkigis (eĉ drinkigis!) ekster elteneblo. Ĉar ordinara homo ne kutimis tagon post tago tiugrade festeni.

La du metropoloj—Leningrad kun tri milionoj da loĝantoj kaj Moskvo sep—estis tre puraj urboj kun tre

vigla aŭtotrafiko. Tre grandajn kontrastojn rilate al la okcident-eŭropaj grandurboj oni ne povis rimarki. Nur la stilo de la konstruaĵoj—iom peza, preskaŭ tuta manko de montro-fenestroj, faris iom malgajan eksteron. Sed la ĉefstratoj estis larĝaj. Larĝigante la stratojn oni eĉ translokigis malnovajn multaĝajn ŝtonkonstruaĵojn, ekz. okulklinikejon oni al ni montris, kiu estis translokigita 100 metrojn kaj samfoje turnita 90 gradojn. Tio okazis per rapideco po 18m. tage kaj samtempe la pacientoj enestis, kaj oni faris ordinarajn operaciojn!—La falinta neĝo estis preskaŭ tuj forveturigita per specialaj efikaj maŝinoj.

La subtera fervojo—la Metro de Moskvo—havas nenian kompareblon en Eŭropaj metropoloj: ĉiu el la staciĥaloj, 50 ĝis 60 metrojn sub la tero, estis grandiozaj artkreaĵoj. Iliaj muroj estis kovritaj per 500 diversaj specoj de marmoro kaj sur iliaj plafonoj kaj muroj estis multege da skulptaĵoj kaj mozaikaĵoj. Ĉiu halo estis konsekrita al unu ideo: armeo, industrio, sporto, historio de la patrujo, k.t.p.

Ni estis la gastoj de la kleriga ministrejo; tuj alveninte al Moskvo ni havis aŭdiencon ĉe la ministrejo. La ministro Kairof mem forestis ie for de Moskvo, sed la helpministro Zimin nin tre afable akceptis, regalis nin per teo kun kukaĵoj, fruktoj kaj ĉokoladaĵoj. Kun li ni faris planon de vizitoj en diversaj lernejoj kaj prezentis al li niajn dezirojn; ĉiujn oni promesis laŭeble plenumi, eĉ la deziron nian vidi Kaŭkazon.



La legsalono en la knabina lernejo n-ro 150 en Leningrad

Poste li faris al ni trihoran prelegon pri la strukturo de la instrua kaj eduka sistemoj en Sovetio. Jen kelkaj elĉerpaĵoj :

En la plej grandaj urboj jam estas efektivigita 10-jara deviga lernado al ĉiuj infanoj. Ĝi komenciĝas kiam infano estas 7-jara kaj estas al ĉiuj tute sama, kaj por knaboj kaj knabinoj. Tamen eĉ en la urboj ĝi ankoraŭ estas parte nur 7-jara kaj kampare nur 4-jara. Sed en la sekvanta 5-jarplano ĝis 1960 estas intenco efektivigi la 10-jaran devigan lernadon en ĉiuj partoj de la giganta ŝtato, en urbo kaj kamparo.

Tre varme li parolis pri la morala edukado, al kiu oni donas specialan gravon. Religio ne estas instruata kaj neniam etiko kiel speciala fako. Sed la morala edukado trapenetras ĉiun instruadon. Grandaj personoj de la historio estas analizitaj ; la instruado de la konstitucio kiel aparta fako havas grandan influon

en la edukado de la konduto kaj estimo al la ŝtato. Dekomence la infanoj estas instruataj, ke ĉiuj nacioj estas egalvaloraj. Ĉiuj popoloj havas samajn rajtojn al la suvereno. Tre grava estas la eduko al la paco tutmonda.


Ni komencis la vizitojn en la plej diversaj lernejoj. Krom en tiuj al ĉiuj devigaj ankaŭ estis en la programo infanaj ĝardenoj, instruistaj seminarioj, sanatoriolernejoj, orfaj hejmoj, popolaltlernejoj, universitatoj. Kaj tiujn tuŝetantaj : pionirpalacoj, instruistaj domoj, infanteatroj. Ĉiu el ili povus esti temo por speciala artikolo.

Oni donis al ni lumigon ĉiuf flankan en la sovietan instruon kaj edukadon. La programo estis tute tro ampleksa por esti konvene digestebla dum tute tro mallonga tempo. Kaj tial la tuteca bildo restis iom kimerita, eĉ multpunkte kontraŭdira. Sed kiel ĝeneralan impreson oni povas diri, ke

ni vidis multon treege bonan kaj altkvalitan, eĉ tian, pri kio ni okcidenteŭropanoj povus lerni.

La instruado ĉe diversaj lecionoj ne tre multe diferencis de tio kion mi spertis en diversaj lernejoj de la okcidento. La instruistoj estis ofte bonaj kaj ili sciis instrui. Sed ia malgajeco ŝvebis super la lernantoj kaj instruistoj. Kio tion kaŭzis mi ne komprenas. La klasejoj havis tro malhelajn kolorojn, la knabinoj preskaŭ ĉiam portis nigrajn grandajn antaŭtukojn kaj nigrajn rozetojn sur la longaj harplektaĵoj. Ĉio ŝajnis tro serioza, rideto tro malofte mildigis la vizaĝon de la instruisto kaj lernantoj. Sed oni vere laboradis en la lernejoj.

Oni diris al mi, ke la sola privilegiita klaso en Sovetio estas la infanoj kaj gejunuloj, kaj tion oni facile povas rimarki en iliaj diversaj lernejoj. Vere giganta laboro estas farita dum 35 jaroj por la popola klerigo. Kompreneble ankoraŭ ekzistas multaj mankoj—kie tiaj ne ekzistus?



Sanatorio-lernejo apud Moskvo



Nova palaco de la orfa hejmo apud Moskvo

Speciale la morala edukado ŝajnas jam porti bonajn fruktojn; ĝenerala konduto de la homoj surstrate kaj en la publikaj lokoj estas senripoĉa. La infanoj en la lernejoj estas agrablaj, ĝentilaj. Kaj almenaŭ mi ne rimarkis, ke desupre venus ordonoj, kiuj bridus la junularon. Verŝajne diversaj infanaj kaj junulaj organizoj efikas plejpotence. Tiaj estas ekz. la pioniroj por 9–14-jaraj, junulligoj por pli ol 14-jaraj kaj poste la partio komunista. Ili prizorgas, ke la membroj dece kondutu, diligente faru siajn hejmtaskojn, ke ili estu servemaj unu al la aliaj kaj precipe al maljunuloj, k.t.p.

Tute neeble estas doni precizan bildon pri ĉiuj diversaj vizititaj lernejotipoj . . . supre nur kelkaj trajtoj pri la vidita.

La vesperojn ni vizitadis diversajn artejojn. Plejofte en la granda teatro de Moskvo, kie ni ĉiam havis la unuajn loĝilokojn. Oni ne vane diras, ke Moskvo estas paradizo por alilandaj prezentaj artistoj. Ne-forgeseblaj estas tiuj multaj teatraĵoj, baletoj, operoj, kiujn ni tie priĝuis.

Ni ankaŭ ne forgesu artgaleriojn; en Leningrad Vintropalaco kaj Ermitaĵo kun 22 km. da irejoj preter

2 milionoj da artobjektoj kaj galerio de Tretjakof en Moskvo kun plejparte naciaj artaĵoj. Estis interese vidi kiel ilin vizitadis multaj klasoj de lernejoj kun iliaj instruistoj kaj soldatoj kun oficiroj serioze studentaj la pentraĵojn.

La nova nubskrapa universitato kun jam pretaj 22.000 ĉambroj (se infano naskiĝus en unu, kaj ĉiutage estus translokigita en novan, li estus



Sur la ŝtuparo de la Vintropalaco

60-jara pasinte ĉiujn ĉambrojn!). Sed ne estas eble pli detale nun priskribi eĉ ĝin. Same Kreml—la plej malnova parto de Moskvo—postulus propran artikolon. La maŭzoleo de Lenin kaj Stalin same.

Por delikatsente transdoni al ni ankaŭ poŝmonon, oni aranĝis al ni enspezadon per “laboro”; ni ĉiuj parolis du-tri minutojn en radio kaj ĉiu estis abundege salajrita en tiu ŝtato de proletaro. Per tiu mono—300 rubloj—ni povis kaj devis—ĉar oni ne rajtis elporti sovetian monon—aĉeti donacojn por la hejmuloj.

Interesa estis la konferenco aranĝita de la tiea instruista gazeto (*Uĉiteljnaja Gazeta*). Ĝin partoprenis krom ni suomoj reprezentantoj de ĉiuj sovetiaj

gazetoj kaj radioestradioj. Ĉar ĝi okazis la lastan labortagon de nia vizito en Moskvo, oni volis fari al ni demandojn pri la impresoj ricevataj dum la vizito. Dekduo estis da demandoj. Inter ili du: Ĉu ni rimarkis, ke sovetiaj instruistoj edukas siajn lernantojn al la paco kaj internacia amikeco? Kaj: Ĉu oni same faras en Suomio? Kiam oni tre jese respondis de nia flanko al ambaŭ, ankaŭ mi petis parolon kaj diris proksimume jene:

“Mi havas certan dubon pri tia tute teoria kaj kolektiva edukado al paco kaj internacia amikeco, kia ĝi estas ĉi tie en Sovetio kaj en nia patrujo, same kiel en la tuta mondo ĝenerale. Ĝi estas ja grava parto, sed se ĝi restas la sola, tiam oni ne povas eviti la samon, kio okazis ĉe la komenciĝo de la dua mondmilito. Ĉar oni ne povas nei, ke samspecan paclaboron oni ankaŭ pli frue faris. Sed kiam la propaganda maŝinaro de militantaj ŝtatoj ekfunkciis, pri la farita paclaboro nenio restis, preskaŭ ĉiuj nacioj konvinkiĝis pri la neceso de la milito kaj ke ĝi estas “defenda milito”. Tiuj kiuj ne konvinkiĝis estis arestitaj aŭ likviditaj. Tial mi kredas nur al tia paclaboro, kiu baziĝas sur kiel eble plej densa reto de amikecrilatoj inter diversaj nacioj, precipe de la najbaraj. La malfacilo konsistas el la manko de komprenilo. Sed ĝuste por tiu celo D-ro Zamenhof en 1887, en la tiama Rusujo, prezentis al la mondo la internacian, neŭtralan, facile lerneblan lingvon, Esperanton, kies ĝenerala akcepto forigos la menciitan de mi mankon. Kaj por la grandaj kaj malgrandaj popoloj ĝia ĝenerala enkonduko alportos ĝis nun ne antaŭviditan benon. Mi proponas, ke la afero estu pritraktota.”

Konante la situacion mi ne atendis, ke mia propono estu akceptita.

Kiam la vizito sabate la 6an de marto proksimiĝis al la fino, ni ree estis invititaj al aŭdienco de la kleriga ministrejo, kaj ĉifoje Kairof mem nin akceptis afable, demandante la impresojn kaj farante al ni tre interesan parolon pri novaj solvendaj problemoj edukaj en Sovetio. La saman vesperon ministro Kairof nin regalis per luksa vespermanĝo, kiun partoprenis eminentuloj el la kleriga kaj ekstera ministrejoj kaj Suomia ambasadoro kun la edzino. Ĉiu el la delegacio ricevis valoran memoraĵon de la ministro.

Nia vizito finiĝis kaj ni refluĝis tra Leningrad hejmen. Oni al ni montris eble la plej bonan—tiel oni ja ĉie faras al gastoj. Ni apenaŭ ekkonis la dorsflankon. Kiaj ekzemple estas la lernejoj en la kamparo? Ankaŭ ni nur prezentis, ke la aĉetpovo de la rublo estis tre malforta; la salajroj ŝajnis esti tute tro malaltaj. Sed verŝajne estas, ke la penadoj altigi la vivnivelon de la popolo ekzistas. Tion montris speciale multo bona, kion ni spertis.

La supra priskribo ŝajnigas—kiel ĝenerale ĉiuj priskriboj pri vizitoj en fremdaj landoj—ke ni tute senĝene parolis kaj babilis kun la indiĝenoj. Tiel kompreneble ne estis, sed ni havis du vere lertajn tradukistinojn tieajn. Tamen pli ol unu fojon ni devis konstati, ke ilia traduko donis eĉ tute kontraŭan koncepton pri la afero diskutita. Kaj povis daŭri eĉ kelkajn tagojn antaŭ ol ni tion rimarkis. Kaj nature kelkaj miskomprenoj restis tute nerimarkitaj. Mi multfoje tial pensis, kiel pli agrable estus, se Esperanto estus la komuna lingvo!

Oratora Konkurso-Debato por ĝejunuloj en Harlemono

La Estraro de UEA ĵus decidis, ke la temo de la ĉi-jara Oratora Konkurso, okazonta dum la sekvanta U.K. en Harlemono, estos: “*La Rolo de la Internacia Lingvo por la Spirita Unueco de la Homaro*”. La subtitolo estas: “Ĉu la diverseco de lingvoj malhelpas la spiritan unuecon de la homaro kaj ĉu la Internacia Lingvo forigas—se jes ĝis kiu grado—tiujn malhelpojn?”

La Estraro decidis okazigi la ĉi-jaran Oratoran Konkursan *en formo de debato*. La temo estas elektita konforme al tiu nova formo: oni povas esprimi plej diversajn opiniojn koncerne la gravegan demandon pri la rolo de la lingvo por la unueco de la homaro.

La debaton povas partopreni ĝejunuloj ĝis 28-jaraj. Ili estas petataj anonci sin kiel eble plej baldaŭ al la Loka Kongresa Komitato, Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando. La lasta dato por sin anonci estas la 31-a de Julio 1954. Pri la tago kaj horo de la debato aperos informo en la kongresa programo.

La debato okazos laŭ la principoj de la Regularo pri la Oratoraj Konkursoj. La konkursantoj devas paroli libere, sed rajtas uzi memorigajn notojn. La tempodaŭro de ĉiu parolado estos proksimume 10 min.

Post la fermo de la debato la Komisiono tuj kunsidos kaj proklamos la 3 gajnintojn. Ili ricevos diplomojn kaj libropremiojn.

La Estraro de UEA esprimas la deziron, ke multaj ĝejunuloj el diversaj landoj partoprenu tiun interesan Debaton kaj kontribuu tiamaniere al pli bona kompreno pri la rolo de la Internacia Lingvo en la hodiaŭa mondo. *D-ro Ivo Lapenna.*



39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion--7-a aŭguston 1954

N-ro 7

OFICIALA KOMUNIKO

Aprilon 1954

Jam pli ol 2000 aliĝintoj ! L.K.K. ne plu akceptas aliĝojn !

Pagoj : GRAVE ! Malgraŭ avizoj kaj instrukcioj, homoj daŭre sendas ĉekojn el eksterlando sen la aldono de la maklero de la nederlanda banko (fl. 0.50). L.K.K. debetas la konton de la koncernaj pagintoj. Tio kaŭzos atendadon ĉe la kasgiĉeto en la kongresejo. Estus dezirinde, ke tiuj malgrandaj ŝuldoj estu likviditaj antaŭ la kongreso (eventuale per rpk. 1 rpk.=fl. 0.25).

Ekskursoj : Evidentas, ke multaj kongresanoj ne zorge legis la instrukciojn. La tuttagaj ekskursoj okazos en la *sama tago* : ĵaŭdon, 5-an de aŭg. La *ĉiutagaj* ekskursoj okazos nur lundon, mardon, merkredon kaj vendredon. Ni jam devis resendi plurajn mendilojn pro malĝustaj mendoj. Bonvolu ne skribi sur la mendilon komunikojn nerilatajn.

Loĝado : Kelkaj mendintoj malkomprenis la instrukciojn. La maklero guld. 2.50 estas por ĉiu mendo (=ĉiu persono). Multaj mendintoj supozas, ke estas avantaĝo resendi la mendilon senpere al Haarlem kaj la pagon al Peranto. Tiel ne estas. En tiaj kazoj la mendilo kuŝas ĝis avizo de la Peranto. Sendu la dokumentojn kaj la pagon ĉiam al la sama instanco. Bonvolu ne skribi apartajn komunikojn sur la mendilon !

Libroservo : Dum la kongreso funkcios Libroservo en kiu havas solvendrajton la libroservo de L.E.E.N. (S-ino S. Mabesoone-Visser, 122 Pythagorasstraat, Amsterdam O.) Eldonistoj, kiuj havas intereson vendi siajn librojn dum la U.K. bonvolu kiel eble plej baldaŭ aranĝi la aferon.

Statistiko (ĝis 31 marto) : Alĝerio 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 9, Belgujo 52, Brazilo 3, Britujo 272, Danujo 64, Finnlando 38, Francujo 227, Germanujo 205, Hispanujo 11, Indonezio 1, Irlando 4, Italujo 73, Japanujo 1, Jugoslavio 75, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 550, Norvegujo 109, Novzelando 12, Portugalujo 7, Svedujo 241, Svislando 26, Turkujo 2, Usono 8. Sumo el 27 landoj : 2000 (pasintjare 960).

*Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.*

Universala Kongreso 1955

Laŭ decido de la UEA Estraro la Universala Kongreso en 1955 okazos en Bologna, Italujo, de 30 Julio ĝis 6 Aŭgusto. La inviton afable faris la Esperantista Grupo "A. Tellini" en Bologna, subtenita de la Itala Esperanto-Federacio.

Belarta Konkurso 1953: Prozo originala

Marjorie Boulton

Tria Premio

Portreto de Poeto

ESTAS travivaĵoj, kiujn oni deziras memori pli detale ol la homa menso povas. Sed, malrapide, senkompate, kvazaŭ la literoj sur altvalora pratempa manuskripto, la detaloj de la plej belaj memoroj malaperas; kaj ni povas nur diri, “Mi ĉeestis miraklon”.

Mi vidis, en simpla ĝardeno, sub la ordinara suno, la momentan apoteozon de la franca poeto Jules Supervielle.

Ne, mi ne volas mistifiki. Mi ne estas profeto nek sanktulino; mi estas eĉ iom materialisma. Oni kutime nomas min “elefanto” aŭ “porko”; mi ŝatas grandajn manĝojn, bonan vinon, volupton, veluron; sed dieco estas senmezure granda kaj ne komprenas la kongruecojn. Do, mi estas vidinta apoteozon.

Mi klarigu. Antaŭ du jaroj, mi vizitis S-ron Supervielle. Li havas apartamenton en Parizo; sed li estis estinta tre malsana, kaj li estis en kampara domo por resaniĝi. Mi kredas, ke la kampara domo apartenis al ia amiko—tio ne gravas.

Mi ne iris adori. Mi estas materialisma, bonsenca virino. Mi tute ne svenas pro filmaktoroj. Mi iris, unue, por diskuti pri iuj tradukoj kiujn mi estis farinta; due, pro amikeco; kaj trie, pro intelekta scivolemeco. Ĉu eble la suno de centra Francujo dum aŭgusto, suno kiu estas pli varma ol la angla suno, moligis aŭ fandis mian cerbon? Mi kredas ke ne.

Mi restis dum tri tagoj ĉe S-ro Supervielle. Lia edzino kaj mia propra patrino ankaŭ estis tie; tial

miaj malamikoj certe ne povas pensi pri famo. Ni ĉiuj multe parolis. Ni bone babiladis pri literaturo, politiko kaj personaj aferoj. S-ro Supervielle montris al mi kelkajn novajn poemojn. Ili estis belaj. Li montris poemon pri sendorma, suferoplena nokto; mi devis forturni la kapon, kaj miaj ŝultroj ektremis.

“Kial vi ridas?” diris la kara, respektinda maljunulo.

“Kara poeto”, mi respondis spasmoplore, “mi tute ne ridas”. Li vidis miajn larmojn kaj estis kortuŝita; li montris al mi alian poemon pri novnaskita infano, kaj mi ridetis. Poetoj ŝatas tiajn kritikojn.

Nenio okazis dum la tri tagoj, nenia sensacio. Ni nur parolis pri poezio, manĝis, sidis en la ĝardeno; sed la apoteozo senbrue pretiĝis.

La granda poeto estas maljuna kaj li suferas pro grava kormalsano. Li antaŭ kelkaj semajnoj estis danĝere malsana, kaj eĉ tiam, en la ĝardeno, ia ombro de morto ŝajnis stari apud lia ŝultro, kvazaŭ policano, kiu deziras aresti iun, sed devas atendi pli bonan kialon. Eble lia danĝera kaj longa suferado helpis spiritigi la maljunan vizaĝon. Ĉiutage li devis foriri post la temanĝo; li devis dormi dum du horoj. Poste, li venadis en la ĝardenon, sub grandegan kaŝtanujon, kaj sidis.

Estis sub la kaŝtanujo ke ĉio okazis. Malgraŭ ĉiaj penoj, mi forgesas multon el niaj paroladoj, eĉ multajn utilajn kritikojn kaj interesajn temojn; sed la apoteozon mi neniam forgesos.

La aŭgusta suno bruligis la ĝardenon. La varmece leviĝis super la tero per vibrantaj ondetoj en la aero. Oni sentis mirindan senmovecon. Oni vidis vinberujojn apud malalta muro, florojn apud la pordo, kukumojn kvazaŭ malvarmecujojn sur la seka grundo. Sur la muro de la domo, apud la granda pordo, granda, malnova sunhorloĝo parolis silente, per nigra ombro, ĝia montra fingro, pri la pasado de ĉiu vivo, kaj precipe pri la pasado de la vivo de maljuna, malsana poeto. La tondro atendis.

La poeto staris dummomente en la malbrila kadro de la pordo. La sunlumo estis forta kontraŭ la senofendaj, maljunaj okuloj, tra kiuj mi vidis la senofendan, noblan animon. Poste, la poeto tre malrapide marŝis al sia kutima kaŝtanujo.

Li subite aspektis strange granda kaj adorinda. Groteske, mi subite sentis bezonon surgenuiĝi, sed mi restis staranta, ĉar mi ne volis embarasi senteman kaj tre modestan poeton.

Li staris apud la kaŝtanujo ; li faris nenion neordinaran, ĉar li nur rigardis la ĝardenon, kvankam li ne rigardis ĝin per ordinara okuloj. Li iomete kliniĝis—li estas alta homo kaj malsana ; ia nedifina laceco kurbigis liajn ŝultrojn. Mi povis deĉifri kelkajn kojnformajn literojn el historio pri suferado ĉirkaŭ la buŝo. La manoj, malfortaj kaj senkulpaj manoj, taŭgaj por la poeta plumo aŭ por karesi torturatan frunton de freneziĝanto, aspektis eĉ pli malfortaj, pli maljunaj. La poeto ŝanceliĝetis ; eble la kompata koro ne perfekte batadis ; suferadoj ŝajnis pezi sur la korpo kaj pro tio mi estis forte konscia pri la korpo, ne pro la ordinara voluptemo de virina rigardo,

sed kontraŭe pro la terura ĉasteco de korpo lacigita per doloro.

Li mem, kiel poeto, estis ĉiam tre konscia pri la korpo ; unu el liaj kritikantoj skribis pri tio. Oni iam opiniis, ke la necerta, interrompita batado de la koro helpis lin kompreni la necertecojn de ĉiuj vivfenomenoj kaj stimulis lian strangan imagpovon kiu ĉiam vidas la pasemecon de la sentebla mondo kaj la similecon de du tre malsamaj aĵoj. Mi ne scias pri tio ; sed, vidante la grandan poeton ŝanceliĝantan sub la kaŝtanujo—forta arbo kiu probable ankoraŭ longtempe staros—mi ŝajne sentis ke tie estas iu kiu staras sur la landlimo inter du mondoj.

Ĉu tiuj du mondoj estis la lando de vivantaj korpoj kaj la lando de senkorpaj animoj ? Oni ne povas tute ne pensi pri la limo inter la vivo kaj la morto kiam oni rigardas maljunan malsanulon ; sed mi opinias, ke la landlimo sub la kaŝtanujo estis io pli komplika kaj sekreta. Estas eĉ mondoj, kiujn nek ordinara homoj, nek pastroj, nek eĉ geamantoj konas ; kaj mi sentis, ke Jules Supervielle estas preskaŭ enirinta nekonatan, pratempan aŭ posttempan mondon. Sed li ne konsciis sian privilegion, ĉar poeto kiel Jules Supervielle ĉiam vivas en pluraj mondoj. Nur mia vidpovo subite pliboniĝis.

Li sidiĝis sub la kaŝtanujo, sur ĝardeno seĝo. La malfortaj, belaj manoj etendiĝis sur fera ĝardeno tablo, sur kiu estis kelkaj verdaj pomoj. Koincide, la pomoj mem estis ventfaligitaj ; ili estis falintaj teren ĉar ili havis vermojn en la koroj.

La poeto prenis pomojn en la mano, ŝajnis mediti pri ili, kaj metis ilin, unu post la alia, sub sian nazon por flari la freŝan, malfortan,

kamparan odoron de pomoj. Stranga Edeno !

Mi estas, kutime, senpacienkulino. Mi deziras, ke ĉio iru rapide ; mi kutime laboras rapide, ruliĝante, brue, kvazaŭ ia betonmiksilo sur la strato ; sed je tiu tago ĉio iris malrapidege, la tempo ŝajnis ĉesi—kaj mi ne grumblis, mi nur deziris, ke la tempo longtempe restu senmova kaj la momentoj de eterno apud la menso de poeto restu en mia tempo. La plej malrapida prozo ne povas vere doni la ĝustan bildon de tiu longa silento kaj la senmova ĝardeno.

Estonta vino dormis en la vinberoj, varmaj sur la muro ; estonta malvarmecco dormis sub la ŝelo de la verdaj kukumoj ; estonta aŭtuno trankviligis la foliojn de la kaŝtanujo, kvankam kaŝtanfolioj estas naturaj ventumiloj. Estontaj pomfloroj silente petegis liberecon en la koroj de la ventfaligitaj pomoj ; kaj mi preskaŭ povis aŭdi mil neskribitajn, nekreitajn poemojn kiuj flugis ĉirkaŭ la maljuna kapo de la poeto. La sfera pomo en la malforta mano iĝis nova mondeto, bonkonduta mondeto, ĉie verda, kun du polusoj kaj ekvatoro. Eble liaj okuloj povis vidi la anojn de la senlandlima mondeto.

Ni komencis paroli. Kiam ni komencis, la sonoj de la natura mondo ree iĝis aŭdeblaj : la zumado de grandaj abeloj, la neofta susuro de folioj kaj la kverado de la multaj kolomboj kiuj vivadis en la ĝardeno—multaj blankaj kolomboj kiuj estis mirinde sentimaj, kaj ĉiam serĉis ion manĝeblan inter niaj homaj aferoj.


Ni parolis pri diversaj temoj, sed precipe pri poezio. S-ro Supervielle havis en sia poŝo libron de alia franca poeto, Henri Thomas. Li montris kelkajn poemojn al mi kaj petis mian opinion pri ili ; la poemoj plaĉis al ni

ambaŭ. Henri Thomas tute ne similas al Jules Supervielle, sed, laŭ mia sperto, nur malbonaj poetoj ne toleras la arton de multaj malsimilaj poetoj. Ni tralegis kelkajn poemojn. Poste ni rigardis la programon de teatraĵo de Supervielle kiu estis ludota en Pariza teatro ; li parolis pri la ludantaro kaj pri la akompana muziko, kiun amiko estis komponinta. S-ro Supervielle montris al mi plurajn kritikojn de sia nova libro, el diversaj gazetoj. Multaj kritikoj estis aprobaj aŭ almenaŭ honestaj, sed mi legis unu kritikon, kiu estis videble kruela, stulta kaj maljusta. Malica, nekomprenanta mondo, la filistra mondo kiu ŝatas turmenti poetojn, iom sin entrudis en la edena ĝardeno, inter la sentimaj kolomboj kaj freŝaj folioj. Mi vere furioziĝis pri la stulta kritikisto kaj sincere diris mian opinion. Kaj mi tro bone scias malbeni francalingve ! Sed Jules Supervielle, multe pli sentema ol mi, restis trankvila. Li jam tro estis suferinta ; li havis la dian netuŝeblecon de tre granda animo. Li nur afable ridetis je mia juna, lojala furiozo.

Ni komencis paroli pli ĝenerale pri la poezio. Ni serĉis difinojn por nedifineblaĵoj, kiel oni kutime faras dum literatura babilado.

Subite la granda poeto levis sian kapon, la poeziplenan kapon kun la granda frunto. Liaj bluaj okuloj karese trarigardis la ĝardenon, la kolombojn, la verdajn pomojn kaj min. Kaj tre dolĉe li diris : “Poezion—? Ĉio aliformiĝas”. Poste ni ambaŭ longe silentadis—ĉio, ĉiam, ĉie aliformiĝas. Per tiu frazo oni povas difini ne nur la poezion, sed la vivon, la amon kaj la homan menson. La poeto mem ĉiam aliformiĝas, kaj

Enigma Konkurso N-ro 88



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 197 : Sorto donas favoron, sorto donas doloron. signalo - oktobro - represo - tegoloj - onklino - dekolti - onidiro - nukseto - arkaika - skandio - fagotoj - acidaĵo - volonte - obstini - rekruto - opiouzo - neesto.

N-ro 198 : Sorto ofte alsendas, kion oni ne atendas. Ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro. Kiam pasanto jam trinkis, li la puton insultas. La morto ŝercon ne komprenas ; oni ĝin vokas, ĝi venas. Fasto kaj preĝo riĉecon ne donas.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 84-a konkurso : S-ro F. Couwenberg (Belg) 142, S-ino N. Koudijs Modoo (Ned) 141, F-ino F. W. Boersma (Ned) 136 p.

Enigmo N-ro 201 : Metu du literojn antaŭ ĉiu el la sekvantaj vortoj por tiel formi novajn vortojn, kies duaj literoj en la sama sinsekvo tiam formas Zamenhofan proverbon : esti - kordo - sperto - incidi - oro - rando - timono - vento - koko - uzi - kalo - flui - ministrejo - balo - selo - salo - kadro - trono - aŭdi - akto - eriko - raso - flamo - verbo - etiko.

Enigmo N-ro 202 : Krucvort-enigmo. Figuro, kvadrato (12×12) sen nigraj fakoj.

Horizontale : 1. scienco (R) ; kaŭzi suferon pro malbonfaro ; multfoja. 2. muzika verko (R) ; sensimila (R) ; malhumila (R). 3. elmontrejo de

valoraĵoj (R) ; rabobirdo ; instigi iun al malbonaĵo (R). 4. pensaĵo ; sankta bildo (R) ; konforma al reguloj de beleco. 5. glazurbriligi ; nekonfuza kaj preciza ; norda cervo. 6. elektrodo (R) ; rabofiŝo (R) ; rabobesto (R). 7. korpoparto ; propono por trinki (R) ; domo por kelkaj bestoj (R). 8. persono kiun oni fervorege servas (R) ; dramparto ; parenco (R). 9. el iu metalo ; maldolĉaĵo ; skeletparto. 10. monavida (R) ; fiŝo (R) ; brutloĝejo (R). 11. tempodifino ; elstara parto de organo ; transformi en ledon. 12. malhumile postuli (R) ; gaso (R) ; sudfrukto (R).

Vertikale : 1. H-1a ; H-5a ; H-9a. 2. H-2a ; H-6a ; H-10a. 3. H-3a ; H-7a ; H-11a. 4. H-4a ; H-8a ; H-12a. 5. H-1b ; H-5b ; H-9b. 6. H-2b ; H-6b ; H-10b. 7. H-3b ; H-7b ; H-11b. 8. H-4b ; H-8b ; H-12b. 9. H-1c ; H-5c ; H-9c. 10. H-2c ; H-6c ; H-10c. 11. H-3c ; H-7c ; H-11c. 12. H-4c ; H-8c ; H-12c. Do ekz : V9 = multfoja ; norda cervo ; skeletparto.

Portreto de poeto : *fino*

ankaŭ aliformigas ĉion. Malsana kaj malforta, tiu poeto longe estis restinta inter du formoj, du patrujoj, inter la vivo kaj la morto, kaj ŝajne liaj suferoj iom plipotencigis liajn mensajn perceptojn. La perfekteco de liaj simplaj difinaj vortoj faris por mi lian apoteozon.

Kolombo flugis apud la griza kapo.

Moŝto R. G. Casey,
Aŭstralia Ministro pri Eksterlandaj Aferoj :

La Plano de Kolombo

Reciproka helpo en Sudorienta Azio

LA “Plano de Kolombo” por ekonomia helpo al Suda kaj Sudorienta Azio estiĝis el la situacio post la dua mondmilito en la regiono proksimume norde de Aŭstralio, kie estis eliĝintaj kelkaj novaj suverenaj ŝtatoj kies ekonomioj estis malordigitaj de malamika okupacio aŭ disrompita de la postuloj de milito.

En la regiono de Suda kaj Sudorienta Azio la plimulto de la novaj naciaj ŝtatoj hereditradiciojn de brita administrado kiuj glatigis la vojon al kunlaborado inter ili kaj kun aliaj ŝtatoj.

Dum januaro 1950 kunveno de Ministroj pri Alilandaj Aferoj de la Brita Naciara Komunumo (Commonwealth), kiu okazis en Kolombo, akceptis proponon, en la iniciato de kiu Aŭstralio ludis grandan rolon, starigi programon de helpo por ŝtatoj de la Komunumo same kiel por aliaj ŝtatoj en la regiono.

Konsila Komitato estas starigita konsistanta komence el Aŭstralio, Kanado, Cejlono, Hindujo, Nov-Zelando, Pakistano kaj Unuigita Regno (Britujo), kaj ties teritorioj sudorientaziaj. Poste la Komitato estas pligrandigita por inkluzivi Usonon, Birmon, Indonezion, Nepalon kaj la asociitaj ŝtatoj de Hinduĉinujo. Observantoj de Tajlando, de la Internacia Banko kaj de la Ekonomia Komisiono por Azio kaj la Ekstrema Oriento nun kutime ĉeestas kunvenojn.



Lia Moŝto R. G. Casey

La Plano de Kolombo havas du flankojn :

(a) Programo de ekonomia evoluigo rilatanta publikan investadon en irigacio, energio, komunikiloj, fervojoj, ĉefvojoj kaj aliaj bazaj servoj. Tiu programo ankaŭ rilatas socian evoluon en la sferoj de publika sano, edukado, domkonstruado k.t.p.

(b) Programo de teknika kunlaborado por la instruado de studentoj kaj aliaj teknikuloj, la pruntedono de

spertuloj, kaj la provizo de edukado kaj teknika ekipaĵo.

La programoj kaj de Ekonomia Evoluigo kaj de Teknika Kunlaborado estas daŭrigotaj ĝis la mezo de la jaro 1957.

La Programo de Ekonomia Evoluigo

Februaron 1951 la aŭstralia registaro promesis kontribui 31,250,000 aŭstraliajn pundojn (1 aŭstralia pundo = 0.80 pundojn sterlingajn = 2.1 usonajn dolarojn) dum la ses jaroj de la Plano. Nov-Zelando konsentis doni po 1,000,000 pundojn en ĉiu de la unuaj tri jaroj. La kontribuaĵo de la Unuigita Regno estis estonta ĉefe en la formo de la liberigo en la regiono de antaŭe neuzeblaj sterlingaj kreditoj, en sumo de pli ol 200,000,000 pundoj, aldone al la monumo de ekonomia evoluo de ĝiaj teritorioj en Sudorientazio. La helpo de Kanado ĝis nun atingis 75,000,000 dolarojn.

La Plano estas ligita kun la programoj efektivigataj de Usono, la Unuiĝintaj Nacioj kaj la Internacia Banko.

Teknika Kunlaborado

Oktobron 1950 Konsilo por Teknika Kunlaborado estas starigita kun ĉeflokejo en Kolombo. Ĝiaj ĉefaj funkcioj estas :—

- (a) la instruado de personoj de Sud-kaj Sudorientaziaj ŝtatoj en landoj kie taŭgaj instrurimedoj estas haveblaj, kaj la elsendo de senditaroj alilanden por studi la plej modernajn teknikojn kaj metodojn ;
- (b) la provizo de spertuloj, instruistoj kaj konsilaj senditaroj por helpi pri planado, evoluigo aŭ rekonstruado, samekiel pri la instruado de personoj rilate al publika administrado, servoj de publika sano, scienca esplorado, agrikultura industria kaj alia produkta agado ; kaj
- (c) provizo de ekipaĵo bezonata por instruado aŭ por la uzo de teknikaj spertuloj.

Oni taksis ke la plano de teknika kunlaborado necesigos elspezon dum la periodo de funkciado de ĉirkaŭ 10,000,000 pundoj. La Unuigita



Azianoj lernas uzi aŭstraliajn farmmaŝinojn

Regno (Britujo) kaj Aŭstralio estas promesintaj provizi ĝis 3,500,000 pundoj, kaj ĉiuj aliaj partoprenantaj ŝtatoj provizos la restaĵon.

Oficejo por Teknika Kunlaborado de la Plano de Kolombo kunordigas la petojn por studantoj kaj spertuloj. La direktoro de la Oficejo estas aŭstraliano, D-ro P. W. E. Curtin.

Aŭstralia helpo

Je la 30a de junio 1953, 13,350,000 pundoj estis jam elspezitaj aŭ planitaj por elspezo en Hindujo, Pakistano, Cejlono kaj Indonezio.

En *Hindujo* la produktaĵo de la vendo de aŭstralia tritiko kaj faruno, valoranta 3,700,000 pundojn en 1951/52, estas aplikita de la registaro de Hindujo al la multcela projekto (irigacio, energio k.t.p.) de Tungabhadra en Madras kaj Hyderabad. Ni estas ankaŭ donintaj ekipaĵon je valoro de 1,000,000 pundoj por la projekto de Tungabhadra kaj por la tiurilata projekto de termoelektra energio en Tamagundum (Hyderabad).

Al *Pakistano* ni estas promesintaj provizi dizelelektrajn lokomotivojn (800,000 pundojn), pumpilan ekipaĵon por la Thal Evoluigo-Aŭtoritato (900,000 pundojn), ekipaĵon por radio-dissendo kaj telekomunikiloj (1,000,000 da pundoj), kaj maŝinaron por la fabrikado de tuboj. Je la komenco de 1953 ni sendis donacon de 2,000,000 da pundoj en la formo de aŭstralia tritiko por venki gravan malabundon de nutraĵoj.

La produktaĵo de surlokaj vendoj de aŭstralia faruno valoranta 300,000 pundojn donita al *Cejlono* dum 1951/52 estas uzita por starigi tuberkulozajn klinikojn. 190 traktoroj kune kun agrikulturaj iloj kaj 25 pezlaboraj ŝarĝaŭtomobiloj estas provizitaj valorantaj entute

400,000 pundojn, por helpi restarigi la produktadon de rizo en la seka zono de Cejlono.

Ni estas konsentintaj provizi al *Indonezio* aŭstraliajn traktorojn kaj ŝarĝaŭtomobilojn por uzado en agrikultura evoluigo, valorantajn 200,000 pundojn.

Sekve de la Programo de Teknika Kunlaborado ni estas provizintaj grandan diversecon de ekipaĵo, enhavanta mikroskopojn, agrikulturan kaj bestaran ekipaĵon al Pakistano; moveblajn kinoveturilojn kaj ekipaĵon por esplora instituto al Hindujo; edukadan kaj man-fabrikadan ekipaĵon al Cejlono; kaj librojn kaj edukadajn materialojn al Indonezio kaj al la britaj teritorioj en Sudorienta Azio.

410 studantoj el la aziaj landoj estas instruitaj aŭ instruataj en Aŭstralio. La instruado estas sur multaj kampoj, ĉefe de publika administrado, inĝenierado, sociaj studoj, agrikultura scienco, edukado kaj la teknologio de nutraĵo. Aldone plia 350 studas en Aŭstralio laŭ la programoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj 2,700 estas venintaj al Aŭstralio per siaj propraj financaj rimedoj.

Ni estas provizintaj 42 spertulojn sur diversaj kampoj, ĉefe al Hindujo, Pakistano, Cejlono kaj la britaj teritorioj en Sudorienta Azio.

La efiko de la Plano de Kolombo sur la ŝtatojn de Azio estas ege malproporcia kun ĝia grandeco. Ĝi ne nur allogas pli da internacia helpo, sed ankaŭ povas generi ekonomian ekspansion multe pli grandan ol la kvanto de helpo provizita.

Ni estas penintaj ĝis nun koncentrigi niajn klopodojn sur metodojn pligrandigi la produktadon de nutraĵoj. Plibonigitaj metodoj de


produktado, enhavantaj mekanikan ekipaĵon, povas ebligi ege pligrandigitan volumenon da agrikultura produktado kaj ni penas forigi la "botelkolojn" rilate al instruistoj kiuj povas direkti la ekspansion de agrikulturo kaj industrio.

La Plano de Kolombo estas bazita sur la principo de la suverena egaleco de ĉiu partoprenanto. Aŭstralio ne arogas al si diri al Hindujo aŭ al Indonezio aŭ al kiu ajn alia ŝtato, kion ĝi devas fari. La liberaj ŝtatoj de Azio diras al ni, kion ili bezonas, kaj ni respondas kiome ni povas plenumi ilian "magazenliston".

Unufojon ĉiujare en la kunveno de la Konsila Komitato ĉiu ŝtato elmontras sian programon de evoluigo por la venonta jaro, kaj ni pridiskutas ĝin kune, tamen sen peni nin iamaniere entrudi.

La Plano de Kolombo estas nova ekvojaĝo en internacia demokratio. Estas nenio sento de supereco en la donado aŭ de malsupereco en la ricevado. Ĝi estas unu el la gravaj postmilitaj elmontroj kiuj helpas doni al ni esperon, ke daŭros la demokratia ideo tute tra la mondo.

Tradukis R. L. Harry.



Azianoj ĉe komerca seminario en Aŭstralio

U.E.A. kandidato por la pacpremio de Nobel

La norvega parlamentano Carl Henry sendis al la Nobel-komitato proponon pri U.E.A. kiel kandidato por la pacpremio de Nobel por 1954. Al la propono estis aldonita ampleksa dokumentada materialo pri la paciga laboro de U.E.A. La Nobel-komitato konfirmis al S-ro Henry la bonordan ricevon de la propono.

Antaŭ kelka tempo la Nobel-komitato decidis ne plu publikigi la listojn de kandidatoj, sed permesis al la proponintoj mem publikigi informojn pri siaj proponoj. S-ro Henry rajtigis min en ĉi tiu maniero konigi al la Esperantistaro lian proponon. (Bonvolu **ne** sendi dankleterojn aŭ ion ajn al S-ro Henry aŭ al la Nobel-komitato).

C. Stop-Bowitz.

La Ven. C. Njanasatta Thera :

La Sesa Granda Koncilio Budhana en Birma

EN la tago de la plenluno de majo en ĉi tiu jaro (la 17an de majo 1954) komencos la dujar-daŭra Unika Historia Okazo en la Budhana mondo, la Sesa Granda Koncilio en Rangoon, la ĉefurbo de la Unuiĝo Birma.

La preparaj laboroj komencis en 1951 kiam la registaro de la Unuiĝo Birma decidis disponigi la sumon 10 milionojn da rupioj (proksimume 750,000 anglaj pundoj) por la preparo de la Tekstoj kaj la konstruo de la necesaj konstruaĵoj kaj ejoj por la granda okazo.

La Sesa Granda Koncilio Budhana estas en nia tempo la plej grava okazo ne nur por la Birmanoj, sed ankaŭ por la tuta Budhana Azio, kaj ni aldonu, por la tuta Budhana mondo, kiu nun etendiĝas trans Azio en Amerikon, Eŭropon, Afrikon kaj Aŭstralion, kaj enhavas multajn eminentajn Esperantistojn.

La Historio de la Antaŭaj Koncilioj Budhanaj

En la historio Budhana de pli ol 2500 jaroj, precize 2498 jaroj post la forpaso de la Budho, okazis kvin koncilioj por la reekzameno kaj teksta revizio de la Instruo de l'Budho, por ke la parolo de l'Budho estu gardata en sia originala pureco aŭtentika.

(1) La Unua Koncilio okazis kelkajn monatojn post la forpaso de la fondinto de Budhismo, la Budho, en la jaro 543 antaŭ la Kristana epoko. Laŭ la teksto de unu el la plej fruaj Budhanaj dokumentoj (*La Mahâparini bâna Sutta, Dîgha Nikâya II*), unu el la Eminentaj Disĉiploj de la Budho, la maljuna

monaĥo Mahakassapa, irante kun sia sekvantaro monaĥa por lastfoje vidi la Majstron, renkontis la monaĥon Subhadda, kiu informis la aron pri la forpaso de la Instruisto. Kiam la pli junaj el la monaĥoj aŭdis la malĝojigan novaĵon, ili aflikte kaj plorĝeme laŭte lamentis pro la subita perdo de sia adorata Perfekta Instruisto. Tiam la maljuna monaĥo Subhadda, kiu monaĥiĝis en sia maljuneco, kaj tial neniam finlernis la altan etiketon kaj moralon de la Budho, konsole diris al la funebrantaj monaĥoj jene: "Ne funebru, fratoj, ne estu afliktitaj dolore, ĉar nun ni fine liberiĝis de la tro rigora Granda Instruisto, la Budho. Dum sia vivo li konstante admonis nin, ke nia konduto estu konforma al la Leĝo Morala. Nun ni estas liberaj agi kiel ajn plaĉas al ni, do ne malĝoju".

Konsiderante la danĝeron de estonta disfalo de harmonio kaj moralo, Mahakassapa tuj post la cindrigo (kremacio) de la mortinta korpo de l'Instruisto, konsilis, ke la ĉefaj kaj kompetentaj disĉiploj kunvenu por la recitado de ĉiuj moralaj kaj filozofiaj instruoj de la Iluminulo, la Budho. Kun la helpo de tiama reĝo Aĝatasattu, centoj da monaĥoj de la Budho kunvenis apud la reĝa ĉefurbo Raĝagaho (reĝa domo) de la regno de Magadho, en Norda Hindujo, kaj recitis la studitan doktrinon de sia Majstro.

Dum tiu unua koncilio en Raĝagaho oni enklasigis la instruajn parolojn de l'Budho en grupojn kaj komisiis kompetentajn disĉiplojn prizorgi la gardadon kaj instruadon de tiaj tekstoj al siaj studentoj, kaj tiel la samaj libroj estis la spirita heredaĵo

kaj misio de generacioj de certaj grupoj de monaĥoj, ĝis kiam ĉiuj libro-tekstoj estis sisteme skribitaj sur daŭra materialo. La kolekto de tiuj tekstoj estas en la instruoj nun recitotaj en la Sesa Koncilio en Birmo.

(2) La Dua Koncilio okazis en 443 antaŭ Kristo, ĉe Vesalio.

(3) La Tria Koncilio estis aranĝita en Pataliputro (nuna Patna) en la jaro 308 antaŭ la Kristana epoko, per la subteno de la fama Budhana imperiestro Aŝoko, kiu tuj post la koncilio dissendis misiitojn al Cejlono, ĉiuj proksimaj landoj en Azio, kaj eĉ al siaj grekaj Seleŭkidaj aliancanoj, la regantoj en Malgranda Azio kaj Egiptujo.

(4) La Kvara Koncilio en Cejlono, 29 jarojn antaŭ la naskiĝo de Kristo, estis grava pro la sistema skribado de la recititaj tekstoj kaj libroj.

(5) La Kvina Koncilio en Birmo, en 1871 K.E., en la urbo Mandalay, estas fama pro la tiama reĝo Mindon, kiu ordonis kaj efektivigis la skribon de la tekstoj gravuritan sur 729 marmoraj platoj.

(6) La Sesa Koncilio ja uzis en la preparo de la tekstoj tiujn ĉi marmorajn gravuritajn platojn, komparante sian preparan eldonon kun la libroj nun uzataj en Cejlono, Tajlando, Kamboĝo kaj aliaj landoj. La tekstoj de la Budhanaj Sanktaj Skriboj, la Tipatako (Tri-Kolektoj), en la Palia lingvo (la Latina-Greka-Hebrea lingvo-egalo en Budhismo) estas, laŭ la taksado de la fama Brita budhologo Prof. T. W. Rhys Davids, dekunuoble pli ampleksaj ol la Sankta Biblio de la Kristanoj. La Paliaj libroj estas presataj en la alfabeto aŭ skribo de la respektivaj landoj, do en la Cejlona (Sinhala), Birma, Siama, Kamboĝa, Latina k.t.p. literoj.

Nun la preparo de la tekstoj estas kompleta, kaj la unua libro estas presata. La vastaj kaj imponaj konstruaĵoj ĉe Rangoon por la Koncilio kaj gastigo de 5,000 recitontaj monaĥoj el la tuta Budhana mondo estas preskaŭ kompletaj. Kvin miloj da plej kompetentaj monaĥoj el deko da landoj kun diversaj lingvoj—arijaj kaj ne-arijaj (la Birma lingvo similas al la Tibeta) solene recitos dum du jaroj la aprobitajn tekstojn. Estos lingvaj malfacilaĵoj, ĉar la prononcado de la Palia ne estas la sama post 2500-jara interrompo, kvankam la tekstoj laŭlitere samas. Oni konsideru la prononcadon de la Latina, Hebrea kaj Greka lingvoj en Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Grekujo kaj en la Slavaj Ŝtatoj !

La recitado okazos en speciale konstruita halo de artefarita kaverno ĉe la Mondpaco-Pagodo, tri kilometrojn de Rangoon. Kvindek hektaroj da grundo estas rezervitaj por la konstruaĵoj de la Koncilio. Tiuj grandiozaj konstruaĵoj fariĝos post la koncilio la Budhana Internacia Universitato.

Vizitantoj el ĉiuj aziaj landoj, eĉ el tiuj malantaŭ la “kurteno”, eminentuloj ekleziaj el Japanujo, Popola Ĉinujo, Tibeto kaj aliaj landoj, reĝaj gastoj, ĉefoj de registaroj kaj ŝtatoj, ambasadoroj, konsuloj de ĉiuj landoj, famaj Budhanaj eminentuloj, aŭtoroj, kleruloj, indologoj kaj budhologoj—ĉiuj estos gastoj de la Birma Registaro kaj popolo, kiuj entuziasme bonvenigos kaj gastigos ilin. Multaj milionoj da pundoj estos elspezitaj por la Sesa Koncilio, sed la Birmaj Budhanoj malavare elspezas kaj laboras senpage por la sukceso, ĉar ili kredas, ke per tiu ĉi oferemo

Fino sur paĝo 158



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimatajn opiniojn.

Singulti kaj hiki

Estas fakto, ke oficiale *singulto* signifas elsendo de aparta sonoro pro subita kuntiriĝo de la diafragmo (F.: *hoquet*, A.: *hiccup*). Alia fakto estas, ke tiu vorto al pli ol unu ŝajnas iom pretenda, iom pedanta en la ĉiutaga konversado por signi tiun etan fiziologian agon.

Hejme ni parolas dulingve: jen nacie, jen internacie; pli ofte internacie! Kiam mia fileto estis 3-4-monata—kaj mi asertas al vi, ke neniun francan vorton li konis, kaj ankoraŭ malpli neniun anglan, malgraŭ la anglo-franca Dulingvismo de S-ro Bressand!—okazis al li singulti. “*Hik! Hik!*” ni aŭdis! Ni flegeme observis lin... Kaj tute nature, kun iom da zorgemo demandis unu la alian: “Nu, ĉu li ankoraŭ... *hikas*?”

En sia franda verko *Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto* S-ano P. Stojan proponas tiun vorton *hiko* kune kun aliaj, cetere interesaj sed laŭ mi ne akceptindaj. Sed en la konkreta okazo ŝajne nenio estas pli internacia ol *fiziologia* onomatopeo; junaj Koreano, Brazilano aŭ Afrikano certe same “*hikas*”, kiel juna Franco? Laŭ mi tia vorto sentrude sed plenrajte havas sian lokon en Esperanto. Ĝi aperas kiel *natura* duoblaĵo de la tro scienca “*singulto*”.

Alia fakto estas, ke “*singulto*” tendencas devii kaj signifi “*plorhiki*” (F.: *sanglot*, A.: *sob*).

André Albault, Francujo.

Pri Lomonosov kaj la Rusa Lingvo

En *Esperanto* (Marto 1954, p. 88) aperis noto de A. H. Middlemast, en kiu li citas la rusan scienciston kaj verkiston M. V. Lomonosov. Tiu citaĵo ŝajnas al mi nekompleta kaj erariga. Estas vero, ke Lomonosov, en la dediĉo de sia “Gramatiko de la rusa lingvo” al estonta caro Petro la Tria diris, ke en la rusa lingvo estas trovebla “la majesto de la hispana, la viveco de la franca, la forto de la germana, la mildeco de la itala kaj, krom tio, la riĉeco kaj la koncizeco de la greka kaj latina lingvoj”. Tamen, pri tiuj karakterizoj li parolis kiel pri virtualaj ecoj, ĉar li estis konvinkita, ke “la rusa vorto povas esti evoluigita al tia perfekteco, kian ni admiras en la aliaj lingvoj”.

Oni devas memori, ke en tiu epoko (komenco de la XVIII-a jarcento) en Ruslando oni verkadis aŭ en la malnova slava eklezia lingvo, aŭ en la latina lingvo. Lomonosov verkis la unuan gramatikon de la rusa lingvo kaj batalis kontraŭ ĉiaspecaj antaŭjuĝoj de la tiamaj oficialaj rondoj rilate la valoron de la rusa lingvo. Oni diradis, ke en tia “lingvaĉo” oni ne povas skribi literaturajn aŭ sciencajn verkojn. En tiaj kondiĉoj li skribis la suprajn vortojn por defendi la rusan lingvon. Lomonosov havas por la rusa lingvo proksimume la saman signifon, kian havas Zamenhof por la Internacia Lingvo.

Ljubov Knjazinskaja-Lapenna,
rus-devena.

Ĉiuokaze

Pluraj legantoj de *Esperanto* rimarkigis ke la vorto *ĉiuokaze* ekzistas simile en aro da lingvoj, do ne estas nura anglaĵo. La ekvivalentoj de tiu-ĉi vorto estas: angle: *in any case*; ĉeĥe: *na vsecken spůsob*; france: *en tout cas*; germane: *jedenfalls*; hungare: *minden esetre*; itale: *in ogni caso*; nederlando: *in allen gevalle*; kaj ruse, laŭ atentigo de Sinjoro Staritzky en Haarlem: *vo vsjâkom sluĉaja*.

H. J., Svislando.

Faktoj pri Norvegujo

Kun granda bedaŭro mi legis en la marta numero de *Esperanto* la artikoleon de Jon Rømmesmo, en kiu li asertas ke la norvega *riksmal*-lingvo, uzata de la granda plimulto de la norvega popolo, estas dana (la tendencan novan nomon *bokmal* neniu *riksmal*-ano aprobis).

S-ro Rømmesmo sendube tre bone scias ke *riksmal* evoluis en Norvegujo, sed, kiel la libro *Faktoj pri Norvegujo* tre ĝuste diras, sub ioma influo de la dana lingvo dum nia 400-jara unio kun Danujo. En antaŭaj tempoj *riksmal* estis skribata dane, sed neniam la prononco estis dana. Nur la plej fanatikaj anoj de la alia oficiala lingvo en Norvegujo, *landsmal*, ankaŭ nomata *nynorsk*, ankoraŭ kelkfoje provas krediĝi al si ke *riksmal* estas dana lingvo.

Pro la lingva politiko de la norvegaj aŭtoritatoj la lingva situacio en nia lando estas nun treege streĉita, sed la esperantistoj harmonie kunlaboras sen atento pri ilia opinio en la batalo pri la norvega lingvo. Mi sincere esperas ke tiu harmonia kunlaboro povos daŭri, kaj tial treege bedaŭras

se iu volas tiri la batalon pri la norvega(j) lingvo(j) ankaŭ inter la esperantistojn.

S-ro Rømmesmo fine aludas al eldiro de D-ro Collinder (kiu estas svedo). Sufiĉu memorigi ke aliaj, same grandaj, filologoj havas tute alian opinion pri tiu punkto.

C. Stop-Bowitz, Norvegujo.

La kompatinda litero “Ĉ”

Ofte mi konstatas, precipe en raportoj kaj resumoj, kiuj postulas la laŭordan uzadon de la alfabeto, ke niaj samideanoj preferas la naci-lingvan sinsekcon: (a) . . . (b) . . . (c) . . . (d) . . . (e) . . . k.t.p. Kial do? Ĉu la iama supersigna polemiko ankoraŭ ne mortis? Ĉu oni neniam komplete kutimiĝos al nia alfabeto?

Ni kompatu la literon “Ĉ” kaj ni ne timu la uzadon: (a) . . . (b) . . . (c) . . . (ĉ) . . . (d) . . . k.t.p.

Gustaff Goossens, Belgujo.

La Sesa Granda Koncilio : *fino*

paco regos en la koro de l'homoj kaj la mondo, kaj tial pli valoras oferi multon por la paco ol perdi ĉion en revolucioj kaj militoj. Pensu pri kongreso de Esperantistoj 2500 jarojn post 1917, la morto de D-ro L. L. Zamenhof, en kiu dum du jaroj oni solene recitas kvinmilvoĉe ĉiujn vortojn parolitajn kaj verkitaĵojn de la aŭtoro de Esperanto!

Certe Esperantistoj ĉeestos la Sesan Koncilion kaj ricevos subtenon por la eldono de Esperanta traduko de la aŭtentikaj paroloj de la Princo de l'Paco, la Budho, la Lumo de Azio.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 260

6-an de Aprilo 1954

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Marto, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Marto 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj	3325	1997
Individuaj membroj :		
MJ 563	703	
MA 3094	3319	
MS 469	616	
Patronoj .. 6	7	
DM 259	271	
HM 58	56	
	4449	4972
	7774	6969

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Linz. D : H. Gerbert, Blütenstr. 3. Tel : 3—322.

FD (Naturismo) : La D.

Salzburg. VD : H. Reiter, Kapitelplatz 2, Jugendstelle.

Wörgl. D : Hans Steiner, Augasse 50.
FD (Turismo) : La D.

Brazilo

São Luís. D : vakas.

Britujo

Liverpool. D : W. Stowell, 16 Cecil Road, Seaforth, Liverpool 21.

New Barnet (Herts.). D : N. Divall, 115 Margaret Road. Tel : Barnet 4844.

Finnlando

Helsinki. VD (Lauttasaari) : vakas.

VD (Maunula) : vakas.

FD (Sportkomerco) : vakas.

Joutseno. D : vakas.

Francujo

Marseille. FD (Edukado) : portempe vakas.

Germanujo

Bielefeld. D : J. Giessner, Fröbelstr. 47a.
FD (Fervojoj) : La D.

Horrem (Bez. Köln). D : H. Jung, Hauptstr. 9. Tel : 190.

Izraelo

Hadera. D : A. Davidovics, Rechov Rambam 1—II.

Haifa. D : Š. Štein, 49 Bar-Giora Str.
Tel : 66021.

FD (Asekuro) : La D.

Tel-Aviv. FD (Komerco ; paperaĵoj) : D. Engelscher, Nahmani str. 37.

Jugoslavujo

Varazdin. D : Božidar Varčik, Javno tužicštvo. Tel : 28.

Norvegujo

Stavanger. VD : F-ino V. Birkevold, Hjelmelandsgaten 77. Tel : 20546—35347.

Svedlando

Borås. D : S-ino R. Emson, Brämhultsv. 6 A. Tel : 159—07.

FD (Literaturo) : D-ro F. Szilágyi, 3-dje Villag. 26. Tel : 244—22.

Gävle. FD (Instruado) : A. Lenner, Byggmästargatan 15. Tel : 6807.

Huskvarna. VD : K. E. Eklund, Wintergatan 8 A.

Svislando

Gerlafingen. D : vakas.

Tunizio

Tunis. D : J. Neukomm, 26 Rue du Portugal. Tel : 25—23.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Törnégren, S-ro P., Malmö, Svedujo
Bekink, S-ro G., Pretoria, Sud-Afriko

PATRONOJ 1954

7. Breth, S-ro F. W., Petrolia, Penn., Usono

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

550. Easton, S-ro F. M., Birmingham, Anglujo

551. Preedy, S-ro G. L., Gloucester, Anglujo

552. Cook, S-ro H. G. L., Parkstone, Anglujo

553. Hammond, S-ro R. E., Coventry, Anglujo

554. Hilder, S-ro E. C., Bideford, Anglujo

555. Squire, F-ino E., West Hartlepool, Anglujo

556. Tegg, F-ino E. W., Ruislip, Anglujo

557. Aarsaether, S-ro E., Oslo, Norvegujo

558. Carrfors, S-ino S., Bromma, Svedujo

559. Edler, S-ro P., Malmö, Svedujo

560. Enstrom, F-ino M. L., Johannesburg, Svedujo
 561. Olhsson, S-ro C., Stockholm, Svedujo
 562. Schöllin, S-ro O., Dyltabruk, Svedujo
 563. Söderberg, S-ro K., Upsala, Svedujo
 564. Allan, S-ro J., Wellington, Nov-Zelando
 565. Dearnley, S-ro E. R., Wellington, Nov-Zelando
 566. Mills, S-ro W., Waimate, Nov-Zelando
 567. Perfect, S-ro S. R., Auckland, Nov-Zelando
 568. Thawley, S-ro E., Wellington, Nov-Zelando
 569. Maier, S-ino A., Vancouver, Kanado
 570. De Boes, S-ro G., Gent, Belgujo
 571. Gozal, S-ro R., Port Lyautey, Maroko
 572. Vidal, S-ro J., Meknès, Maroko
 573. Rosetti, S-ro R., Birmingham, Anglujo
 574. Gaillard, S-ro A., Paris, Francujo
 575. Poly, S-ro P., Paris, Francujo
 576. Herforth, S-ro A., Tailfingen, Germanujo
 577. Goppel, S-ro L., Limburg, Germanujo
 578. Haus, S-ro J., Düsseldorf, Germanujo
 579. Jacobs, F-ino E., Flensburg, Germanujo
 580. Jung, S-ro H., Horrem, Germanujo
 581. Achilli, S-ro P., Mazagan, Maroko
 582. Gorbatoŭ, S-ino A., Oujda, Maroko
 583. Whitworth, S-ro A., Thorold, Kanado
 584. Bainbridge, F-ino J., Carlisle, Anglujo
 585. Sarfas, S-ro E. W., New Barnet, Anglujo
 586. Estrebou, S-ro J., Meknès, Maroko
 587. Planck, F-ino M. L., Kitzbühel, Aŭstrujo
 588. Schmidt, Pastro A., Graz, Aŭstrujo
 589. Albuquerque, S-ro J. F. de, Pirassununga, Brazilo
 590. Dionisio, S-ro C. H., S. Leopoldo, Brazilo
 591. Cavalcanti Filho, S-ro M. T. M., João Pessoa, Brazilo
 592. Oliveira, S-ro L. J. de, Santos, Brazilo
 593. Passos, S-ro S. F., Paracuru, Brazilo
 594. Verde, D-ro D. L., Limoeiro do Norte, Brazilo
 595. Wehrs, F-ino E., Niteroi, Brazilo
 596. Ekbom, F-ino A., Boden, Svedujo
 597. Ottersson, F-ino I., Akersberga, Svedujo
 598. Tuch, F-ino R. M., Toronto, Kanado
 599. Lopez, F-ino S., Sidi-Yahia du Rharb, Maroko
 600. Roelofs, S-ro J. J., Soest, Nederlando
 601. Müller, S-ro, Casablanca, Maroko
 602. Muller, F-ino F., Meknès, Maroko
 603. Cochrane, F-ino I. M., Dunfermline, Skotlando
 604. Haxton, S-ro J. T., St. Andrews, Skotlando
 605. Hill, S-ro A., Birmingham, Anglujo

606. Tozer, S-ro W. G., Kedah, Malajo
 607. Jurković, S-ro M., Sl. Brod, Jugoslavujo
 608. Šaponjić, S-ro M., Beograd, Jugoslavujo
 609. Žunko, S-ro O., Pula, Jugoslavujo
 610. Assayag, S-ro S. M., Port Lyautey, Maroko
 611. Hug, S-ro R., Casablanca, Maroko
 612. Tronchon, S-ro H., Casablanca, Maroko
 613. Bemaldo, S-ro L., Lisboa, Portugalujo
 614. Kalmar, S-ro E., Hollywood, Cal., Usono
 615. Boge, S-ro E., Högsby, Svedujo
 616. Brown, S-ro A. L., Washington, D.C., Usono
 617. Keller, S-ro A., La Celle-St. Cloud, Francujo
 618. Lagrange, S-ino E., St. Germain-en-Laye, Francujo
 619. Aleman, F-ino A., Habana, Kubo
 620. Roblin, S-ino M., Meknès, Maroko
 621. Grice, S-ro W., Darwen, Anglujo
 622. Morton, F-ino H. R., London, Anglujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : W. H. King 20ŝ., A. Whitworth 10ŝ., B. Nielsen 4ŝ., F-ino I. M. Cochrane 15ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : Nov-Zelanda Esp. Asocio £10, S-ino Meurrens 7ŝ., Bournemouth Esp. Soc. 42ŝ., M. Fernández Menéndez 20ŝ., F-ino M. H. Skeate £3, F-ino E. Baldwin-Smith 20ŝ., T. A. Goldman £7, R. Kogel 20ŝ., Ges. H. Michling 83ŝ., Prof. Heinrich Rissom £20, K. Schönrich 8ŝ., Wiesbaden Esp. Gr. 16ŝ., L. Apcher 20ŝ., C. Thollet 20ŝ., S-ino L. Marthaler 9ŝ. 6p., P. Metivier 9ŝ. 6p., S-ino H. Fischer 33ŝ. 6p., T. Havana 4ŝ. 6p., P. Angerer 2ŝ., F-ino C. Zorgdrager 18ŝ., S. M. Assayag 5ŝ., Svisa Esp. Societo £12, H. Kürsteiner 32ŝ., A. Albault 2ŝ. 6p., La Urso, Sarpsborg 25ŝ., S-ino Ducloux 20ŝ., Popola Esp. Gr., Blois £5, I.S.A.E. £5.

Sumo ĝis 31-3-1954 : £454 3ŝ. 6d.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

NIAJ MORTINTOJ

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Bachelier, S-ro Gaston, mortis en Parizo la 7an de aprilo. Li estis sindona laboranto por la movadoj nacia kaj internacia.

Egerrup, D-ro Hans, mortis en Aarhus la 7an de marto. Li estis Prezidanto de C.D.E.L. dek jarojn kaj aŭtoro de la romano *D-ro Dorner*.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj la Eternulo estos rifuĝo por la premato, Rifuĝo en la tempo de mizero.

Ps. 9. 9.

BP. Garaĝo Nérée-Lesage (apud preĝejo de Sta. Huberto), Terhulpen-steenweg 225, BOSVOORDE-Brussel. Tel: 489263. Rabato por Esperantistoj.

Bildetojn pri Nia Sinjorino, kiajn oni konservas en preĝlibro, kolektas kaj interŝanĝas S-ino Em. Chantrain, Deuzeldstr. 83, SCHOTEN, Antwerpen, Belgujo.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGÉ (Maine et Loire), Francujo. Represo petata.

Usona knabo 18-jara deziras korespondi kun gesamideanoj pri sciencaj temoj. Nepre respondos. Jon B. Willarson, 2045 N. 56th St., MILWAUKEE 8, Wis., Usono.

Itala 24-jara studentino irus ĉe angla familio dum 6-7 monatoj por domlaboro en infanejo cele ekkoni anglan lingvon. Chierico, INARZO (Varese), Italujo.

Sincerajn dankojn al geamikoj de multaj landoj kiuj bonkore sendis poŝtkartojn, broŝurojn, k.t.p. por nia ekspozicio. Bone ĝi sukcesis. S-ro B. S. McCracken, Auckland, Nov-Zelando.

Miloj da franc(in)oj deziras amikiĝi kun simpatiaj alilandul(in)oj. Korespondemuloj skribu al Esperanto, MULHOUSE (70), Francujo.

S-ro Spiros Arlomitis, redaktoro de la ĵurnalo *Akropolis* de Athinai, Grekujo, ne povante aparte danki ĉiujn kiuj sendis al li gratulleterojn por la de li publikita artikolo favore al Esperanto, elkore dankas.

Budha Tago, Jaro 2498: Okaze de la Plen-Luno de Majo, Budhanoj tra la tuta mondo deziras Pacon kaj Benojn al ĉiuj Estaĵoj ĉie.

3 komencantoj en dana militrifuzantejo deziras korespondi. Ni garantias respondon. S-ro Asger Larsen, C.A., OKSBØL, Danlando.

Juna terkulturisto deziras pasigi iom da tempo en eksterlanda terkulturejo, volonte transmara. Lingvoj angla kaj germana. Leterojnkunkondiĉoj peras S-ro E. B. Larsen,

Borggaard, Sierslev, STOREHEDDINGE, Danlando.

16-jara filatelisto interŝanĝus p.m. kun eksterlando, prefere Belgujo kaj Francujo. Peter Meinhardt, Gärtnerstr. 510, LOHR/Main, Germanujo.

Alumet-industrio kaj etikedoj por alumet-skatoloj: mi deziras korespondi kun personoj en tiuj industrioj aŭ interesataj pri ili en ĉiu lando. A. Fleming, 3 Alpha Road, New Cross, LONDON S.E. 14, Anglujo.

Fruajn leterojn antaŭ 1820 kun poŝtaj surstampoj serĉas Howard Smith, Cedra, Combpyne, AXMINSTER, Anglujo.

Eŭropa Turista Servo, Konijnperken 109, BOSVOORDE-Brussel, Belgujo. Subtenu, petante turismajn informojn pri Eŭropaj vidindaĵoj (1 resp. kup.)

Spertan kursgvidanton por la sezono Septembro 1954-Marto 1955 serĉas Norvega Esperantista Ligo, Box 942, OSLO, Norvegujo.

Framasonoj, kiuj intencas partopreni en la U.E.A.-Kongreso en Haarlem, urĝe estas petataj tuj anonci sin al la Delegito por Framasonaj Aferoj en Nederlando, s-ro A. G. Hoekma, Laan van Eik en Duinen 20, DEN HAAG, Nederlando.

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO EN JUGOSLAVUJO

Vojvodina Esperantista Ligo en Novi Sad aranĝos internacian ferio-semajnon sur la malnova fortikaĵo Petrovaradin, apud la bordo de Danubo, kiu nun estas ordigita kiel amuzĝardeno, de la 21 ĝis 28 aŭgusto 1954. Okazos prelegoj pri Jugoslavujo, interesaj ekskursoj, banado, amuzaj vesperoj, vizitoj al muzeoj, teatro, k.t.p. Detala prospekto kaj aliĝilo havebla kontraŭ unu rpk. Partoprenontoj bonvolu anonci sin kiel eble plej baldaŭ, ĉar oni povas akcepti nur 30 personojn, ĉe la Vojvodina Esperantista Ligo, Zmaj Jovina str. 4/II, NOVI SAD, Jugoslavujo.

HELSINGÖR
17-24 de julio 1954

okazos en la Internacia Altlernejo internaciaj feriaj Esp-kursoj : daŭriga, konversacia, prepara por Esp-instru-ontoj (Cseh kaj lernolibra metodoj), por Esp-gvidantoj kaj por infanoj. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando
Post la kurso aŭtobusa karavano al Haarlem

En la listo de la 10 plej bonaj verkoj aperintaj post la milito (laŭ "Esperanto en Skotlando", "Nederlanda Esperant-isto" k.a.) troviĝas ambaŭ verkoj de
D-ro Ivo Lapenna

RETORIKO kaj AKTUALAJ PROBLEMOJ

Nuna prezo : ĉiu libro 12 ŝil., afr. 6p.

Se vi ankoraŭ ne legis ilin, mendu tuj ĉe via landa libroservo aŭ ĉe :

Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo

Antaŭ Haarlem

SKOTLANDO VOKAS VIN !

INTERNACIA FERIA SEMAJNO

Julio 24a ĝis 30a, 1954

en

Newbattle Abbey Kolegio,
proksime al Edinburgh

Modernaj komfortoj - Bonaj manĝaĵoj
Allogaj ekskursoj kaj aliaj distraĵoj
Modera kosto - Nur 60 lokoj

Skribu tuj por detaloj al :

La Sekretario,
Edinburgh Esperanto Society,
20 Glendevon Road, Edinburgh 12,
Skotlando

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo